

KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 377 (núm. 9 de la 6a època) DESEMBRE/DECEMBRO 2025

MARO ESTAS GUTARO

WWW.ESPERANTO.CAT



**Kiam lingvoj ŝanĝas
siajn alfabetojn**

**Quan les llengües
canvien d'alfabet**

IJK 2026 okazos en Katalunio!

ENKONDUKO	
Redaktora saluto.....	3
KIAM LINGVOJ ŜANĜAS SIAJN ALFABETOJN QUAN LES LLENGÜES CANVIEN D'ALFABET	
Alfabetaj zigzagaj en la Sovetio de la 1920aj kaj 1930aj jaroj	4
El castellà islàmic escrit amb l'alfabet àrab.....	8
Bosna lingvo	12
Esperanto kaj la japana lingvo – el la vidpunkto de la medialo.....	17
LINGVOJ - LLENGÜES	
La statistikaj datumoj: ĉu ni vere kapablas mezuri la sanstaton de lingvo?.....	21
LITERATURA	
Kunvojaĝo	23
Poezia angulo	24
INTERVJUO	
Hèctor Alòs: «Mi havis la bonŝancon esperantistiĝi en ĝusta momento kaj ĝusta loko».....	25
Fa cent anys: La dictadura i el congrés de KEF a Palma	29
Josep Franquesa, l'homenot esperantista	30
Josep Franquesa, la esperantista grandhomo.....	31
ANGULO POR KOMENCANTOJ	
Krucvortenigmo: bestoj	32
NIA AGADO – LES NOSTRES ENTITATS	
La 2025a UK en Ĉeĥio: Burna, bunta kaj piza	33
Ses monatoj sub la suno	34
De la nova fornada	35
Vizito de lernantoj al CES	37
La sendependa vivo de la Esperanto-grupo de Ateneu Llibertari de Gràcia.....	38
Asocia agado	40
Lasta agado de KEJ: IJK 2026 okazos en Katalunio!.....	42
LA FENESTRO	
Profesia sekreto	47

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

revuo-ke@esperanto.cat

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
Apartat 1008 - 08204 Sabadell
Papa Pius XI, 130 - 08208 Sabadell
www.esperanto.cat
info@esperanto.cat

Consell de redacció: Pere Fornells,
Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Pedro M. Martín
Burutxaga, Òscar Puig, Alfons Tur, Carles Vela,
Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Siru Laine,
Pedro M. Martín Burutxaga (esperanto),
Anna Maria Muñoz Morata (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO
KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

President/Prezidanto: Alfons Tur,
Vicepresidenta/Vicprezidanto: Sandra Vives,
Secretària/Sekretario: Toni Espinosa,
Tresorera/Kasisto: Clara Casanovas,
Vocals/Voĉdonantoj: Jordi Aguilar,
Mon Cardona, Lluís de Gibert, Antoni Gimeno,
Òscar Hernández, Siru Laine, Ferriol Macip,
Sebastià Ribes, Sílvia Soler, Carles Vela, Repre-
sentan de KEJ/Reprezentanto de KEJ: Jaime
Tapia.

JOVENTUT CATALANA D'ESPERANTO/
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO

President/Prezidanto: Jaime Tapia,
Vicepresident - Vicprezidanto: Isaac Giménez,
Secretari/Sekretario: Irene Albert,
Tresorer/Kasisto: Jan Baserba,
Esdeveniments/Arangoj: Hayden Reed
Hendricks, Comunicació/Komunikado: Javier
Terraza, IJK: Òscar Hernández, Representant
a TEJO/ Komitatano A en TEJO: Pol Jimenez.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la
aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto
esprimas opiniojn de la eldonisto KEA.
Els autors que signen els articles són els
responsables dels seus continguts. L'opinió de
KEA només s'expressa a través de l'editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència
Creative Commons Reconeixement-
NoComercial-SenseObraDerivada 2.5
(<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de
reproduir-los i distribuir-los, sempre que
es faci sense afany de lucre i se'n reconegui
explícitament els autors, i l'Associació
Catalana d'Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
08004 Barcelona

REDAKTORA SALUTO

Estem acostumats que hi hagi una sola manera d'escriure cada llengua, però sovint no és així. Més enllà de les variacions o evolucions de les normes ortogràfiques, de vegades ens trobem amb llengües que s'escriuen amb més d'un alfabet. Això pot passar d'una manera simultània, en l'espai i/o en el temps, o bé específicament en zones o èpoques determinades. Els motius també poden ser molt diversos. En aquest número del *Kataluna Esperantisto* fem un petit acostament a algunes d'aquestes llengües, encara que els articles que trobareu no sempre estan centrats en aquest aspecte. Esperem que us pugui semblar interessant i enriquidor.

Aquest número de la nostra revista té la peculiaritat que és una mena de frontissa. Ha estat l'únic número d'enguany i el darrer que ha endegat en Pere Fornells com a redactor. Ell és, de fet, qui té la major part del mèrit. Però el número, l'hem acabat de bastir des del Consell de redacció i la Junta de KEA. L'actual situació l'entenem i la volem com a transitòria, doncs la intenció de la Junta és que la periodicitat torni a ser de dos números l'any i que el més aviat possible tornem a tenir un redactor/a en cap que pugui coordinar tot l'equip de redacció.

A sota trobareu el comiat d'en Pere Fornells com a redactor, a qui des de la Junta de KEA volem agrair de tot cor la dedicació i la tasca feta durant aquest temps.

Amb aquest número que teniu a les mans, m'acomio de la responsabilitat de ser el redactor del Kataluna Esperantisto. Durant aquest temps que he tingut el privilegi d'encarregar-me d'aquesta tasca m'he esforçat tant com he sabut per mirar de mantenir el nivell excel·lent que em van deixar els meus predecessors: la Montserrat Franquesa, que va endegar aquesta època de la revista, en Xavier Margais i n'Elisabet Abeyà. No sé fins a quin punt ho he aconseguit. Sí que sé que si ha estat possible és, sens dubte, gràcies a tot l'equip de redacció i tota la gent que ha col·laborat aportant continguts, però també revisant textos, maquetant, sumant idees, suggerint col·laboradors i sovint també contactant-hi, encarregant-se de la impremta i els enviaments, etc. O senzillament donant consell i suport. Ha estat molta gent i, si em poso a fer una llista, segur que acabaria sent incompleta. A tothom, moltes gràcies.

La junta de l'Associació Catalana d'Esperanto

Ni kutime pensas, ke ĉiu lingvo havas sian propran skribmanieron, sed ofte ne estas tiel. Aldone al ŝanĝoj aŭ evoluoj de ortografiaj normoj, oni foje renkontas lingvojn, kiuj estas skribataj per pli ol unu alfabeto. Tio povas okazi samtempe (space kaj/aŭ tempe) aŭ specife en certaj regionoj aŭ epokoj. La kialoj ankaŭ povas esti tre diversaj. En tiu ĉi numero de *Kataluna Esperantisto* ni proponas modestan trarigardon al kelkaj el tiuj lingvoj, kvankam la artikoloj, kiujn vi trovos, ne ĉiam fokusiĝas ĝuste pri tiu aspekto. Ni esperas, ke tio estos por vi interesa kaj riĉiga.

Tiu ĉi numero de nia revuo havas apartan econ, ĝi estas iamaniere ĉarnira, ĝi estis la sola numero ĉiujare kaj la lasta iniciatita de Pere Fornells kiel redaktoro kaj al kiu pleje ŝuldiĝas la sukceso, sed kiun ni finredaktis el la Redakcikonsilio kaj la Estraro de KEA. La nunan situacion ni konsideras kaj volas transiri, ĉar la volo de la Estraro estas repreni la aperritmon de du numeroj jare kaj ke kiel eble plej frue ni havu novan ĉefredaktoron kunordigantan la tutan teamon.

Tuj sube vi trovos la adiaŭan mesaĝon de Pere Fornells kiel redaktoro, kies sindediĉo kaj laboro farita dum tiu tempo nia Estraro dankas elkore.

Per tiu ĉi numero, kiun vi nun legas, finiĝas mia respondeco kiel redaktoro de Kataluna Esperantisto. Dum tiu tempo, kiam mi havis la privilegion okupiĝi pri tiu tasko, mi penis laŭ mia kapablo konservi la bonegan nivelon, kiun mi ricevis el miaj antaŭuloj: Montserrat Franquesa, kiu startigis ĉi tiun epokon de la revuo, Xavier Margais kaj Elisabet Abeyà. Mi ne scias ĝis kia grado mi sukcesis. Mi ja scias, ke se tio eblis, sendube estis danke al la tuta redakta teamo kaj al ĉiuj, kiuj kunlaboris per siaj tekstoj sed ankaŭ per multaj aliaj taskoj: revizii, komposti, alporti ideojn, sugesti kunlaborantojn (kaj ofte kontakti ilin), okupiĝi pri presado kaj sendado, ktp. Aŭ simple per konsilado kaj subtenado. Estis vere multaj homoj, kaj se mi ekfarus liston, ĝi certe restus nekompleta. Al ĉiuj, koran dankon.

La estraro de Kataluna Esperanto-Asocio

ALFABETAJ ZIGZAGOJ EN LA SOVETIO DE LA 1920AJ KAJ 1930AJ JAROJ

Hektor Alos i Font

lama socilingvisto, esplorinto pri la ĉuvaŝa lingvo



Dulingva afiŝo kun la teksto “pura zono!” en la rusa kaj “kontrolata zono!” en la kalmuka ĉe la bushaltejo.

Kiel estas ankoraŭ larĝe konate de okcident-eŭropaj iom-pli-ol-mezaguloj, kurioze la Oktobra revolucio okazis la 7an de novembro 1917. Inter la unuaj dekretoj, la Deklaracio pri la Rajtoj de la Popoloj de Rusio proklamis la egalecon kaj suverenecon de ĉiuj popoloj de la ŝtato. La celita grado de tiu suvereneco estas ege diskutebla, sed ekster ĉia dubo la novaj aŭtoritatoj havis kiel unu el siaj prioritatoj vastegan programon, celantan la klerigon de la amasoj.

En la Rusio de la jaro 1920, baldaŭ transprenonta la nomon de Unio de la Sovetaj Socialismaj Respublikoj (kurte, USSR, Sovetio), oni parolis pli ol 200 lokajn lingvojn, sed, laŭ Alpatov, malpli ol 20 estis skribitaj. Li listigas la

uzon de ses alfabetoj: la cirila, la araba, la armena, la kartvela, la hebrea kaj la mongola. Indus aldoni almenaŭ la latinan, uzatan interalie de la larĝaj germana, pola kaj “moldava” minoritatoj, la grekan de la greka minoritato el Krimeo kaj Odeso, kaj kredeble iagrade funkciis ankaŭ la ĉina kaj la korea skriboj por la koncernaj naciaj loĝantaroj en la rusia Ekstrema Oriento.

Parto de la skribaj lingvoj havis longan tradicion, dum por aliaj skribo aperis nur kelkajn jardekojn antaŭe. Ekzemple, elde Kazano, dum la dua duono de la 19a jarcento, estis kreitaj de misiistoj skribformoj surbaze de la cirila rusa por nekristanaj aŭ supraĵe kristanigitaj popoloj. La celo estis ĉefe religia, sed ankaŭ la

disvastigo de la rusa lingvo, per la kreado de lernejoj kaj pia literaturo. Tiu misiisma agado kaŭzis, ke por pluraj lingvoj, la cirila skribo ekkonkurencis kun pli frua alisistemo, ekz. por la tatara aŭ la kalmuka. Rimarkindas ankaŭ, ke en kelkaj okazoj proksimaj lingvoj dividis komunan skriban formon. La plej konata ekzemplo estas la uzo de la ĉagataja en centra Azio, sed eblas mencii, ke taĝikoj skribe uzis la klasikan persan lingvon, same kiel buriadoj kaj eĉ la tjurklingvaj tuvoj uzis la klasikan mongolan.

Laste, sed ne balaste, necesas substreki, ke la vasta plimulto de la tiama rusia loĝantaro ne sciis legi. Legipovo ege dependis de la grado de urbiĝo de la koncerna popolo, de ĝia religio (inter pro-

testantoj kaj judoj estis multe malpli da analfabetoj) kaj preskaŭ ĉie grandis diferencoj inter inoj kaj viroj (esceptoj estis protestantoj kaj kato-likoj).

La kialoj por la alpreno de la tradici-rompa komenca sovetia lingvo-politiko, ege fortiganta la rolon de la minoritataj lingvoj en instruado kaj administracio, estas vigle diskutataj en la faka literaturo. Sendube rolis humanisma strebo al plialtigo de la klereco de la popolo, sed diversgrade miksiĝis praktikaj celoj, kiel la neceso de pli alta legipovo de la laboristoj por antaŭenpuŝi rapidan industriigon kaj teknologian progreson. Pli cinike, Kalinin asertis, ke “la celo de la sovetia politiko ĉiam estis instrui la homojn de la kirgiza stepo, la malgrandan uzbekan kotonkultiviston kaj la turkmenan ĝardeniston akcepti la idealojn de la leningrada laboristo”.¹ Fakte, la bolŝevikoj ne tiel foris de la kristanaj misiistoj en tio, ke legipovo kaj lerneja instruado funkciis kiel potencegaj rimedoj por prozelitismo. Tre prave, la aŭtoritatoj komprenis, ke iliaj mesaĝoj ne atingos grandan parton de la loĝantaro, se ili uzus nur la rusan. Tio implicas la funkciigon en la lerneja instruado de multaj lingvoj ĝis tiam sen skribo kaj samtempe la ekon de vastaj programoj de legopovigo en tiuj lingvoj por plenkreskuloj. Certa nombro da lingvoj ricevis komence de la dudekaj jaroj skribojn surbaze de diversaj alfabetoj, kiel la adigea surbaze de la araba en 1918. Tamen la araban alfabeton (uzatan por diversaj tjurkaj kaj nord-kaŭkazaj lingvoj) kaj la mongolan (uzatan por la burjada kaj la kalmuka) oni ofte konsideris ligitaj al religio kaj malmoderneco, sekve unua ondo de alfabetŝanĝo ekokazis. La kalmuka, ekzemple, estis ciriligita en

1924, dum la romaa ricevis sian unuan skribon en la cirila en 1926.

La cirila alfabeto, uzata de la majoritata lingvo de la ŝtato, tamen vekis suspektojn. La elstara lingvisto Jevgenij Polivanov atentigis jam en 1923, ke la cirila skribo memorigas al tjurklingvanoj la “rusan koloniismon” kaj la rusigan agadon de misiistoj. Tia tute ne estis la sento vid-alvide al la latina alfabeto, ĝuanta grandan prestiĝon pro la internacieco de okcident-eŭropaj lingvoj. Tamen, la latinigo de la lingvoj, por kiuj oni ĝis tiam uzis aliajn alfabetojn, malfaciligus al la novaj generacioj la aliron al ilia skriba kultura heredaĵo. La debatoj estis plurjaraj, sed fine, en 1926, en Bakuo, okaze de la unua tjurkologia kongreso, oni decidis la transiron de la tjurkaj lingvoj de Sovetio al la latina alfabeto. Same oni faris por la finn-ugraj, nord-kaŭkazaj kaj siberiaj lingvoj. Eĉ pri la rusa diskutoj ekestis, ĉar bolŝevismo estis determinisma. Oni prognozis la estontan kunfandiĝon de ĉiuj popoloj. Ĉar la latina laŭdire montriĝis la evidenta konverĝpunkto de ĉiuj nepre unuiĝontaj skribsistemoj, tiam ĉu eble tuj enpaŝi tiudirekten?

Fakte, la laboro de la sovetiaj lingvistoj dum la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj, kaj precipe de la Tutsovetia Centra Komitato por la Nova Alfabeto (TCKNA), pri la kodigo de la lingvoj de Sovetio estas senkompara en la monda historio. En 1936, la bulteno de la Komitato publikigis, ke, el la 102 naciecoj tiam agnoskitaj en USSR, 90 jam havis ortografiajn normojn por siaj respektivaj lingvoj kaj 71 lingvoj uzis la latinan alfabeton. Tiel, la menciitaj adigea kaj kalmuka latinigis, respektive, en 1927 kaj 1931. Male, malgraŭ longaj diskutoj, la jida konservis la hebrean alfabeton, dum latinigis la kvar aliaj “judaj” lingvoj de Sovetio: la krime-juda, la karaima, la montar-juda, kaj la buĥara juda.

”

La laboro de la sovetiaj lingvistoj... pri la kodigo de la lingvoj de Sovetio estas senkompara en la monda historio

”

La celo de la sovetia politiko ĉiam estis instrui la homojn de la kirgiza stepo... akcepti la idealojn de la leningrada laboristo
– Mikhail Kalinin

”

La cirila skribo memorigas al tjurklingvanoj la ‘rusan koloniismon’.
– Jevgenij Polivanov

”

De la revoluciaj idealoj de 1917, en la lingva tereno, restis nur ombro

¹ Citita en: Crisp, Simon. «Soviet Language Planning 1917-53». En *Language Planning in the Soviet Union*, red. de Michael Kirkwood. Macmillan, 1989, p. 24-25.

Certe, nuntempe eksas la tiama desupra teknokrata aliro, laŭ kiu blanka vira spertulo alvenas en komunumon, esploras la lingvon, eltiras el la diversaj dialektoj unu kaj surbaze de ĝi konstruas fonologi-bazitan skribon kaj ofte vortaron. La diferencoj inter dialektoj povas esti grandaj, dum la diferencoj inter supozataj malsamaj lingvoj povas esti etaj. La uzo de komuna alfabeto por parencaj lingvoj faciligis la interkomprenon inter malsamlingvanoj, sed strikte fonologiaj skriboj povis esti ne idealaj por tre disdialektigintaj lingvoj. Al tiu lingvistika laboro aldoniĝis la kreado de lerneja sistemo por geknaboj, mirado da alfabetigaj kursoj por geplenkreskuloj kaj la kreado de gazetaro. Laŭ Kreindler, en 1925 lernejoj lernolibroj estis eldonitaj jam en 25 lingvoj, dum dek jarojn poste ili aperis en 104. En la lernojaro 1938/39, pli ol 70 lingvoj estis instruataj en lernejoj. Kaj tiu instruado plej ofte okazis ĉie, kie efektive la koncernaj popoloj vivis. Tiel Uzbekio, ekzemple, organizis instruadon en 22 lingvoj, Ukrainio en 17, kaj Dagestano en 20. Por preni unu ekzemplon, en la lernojaro 1930/31 funkciis 1203 jidaj lernejoj en Ukrainio, Belarusio kaj Rusio kun entute 137 200 lernantoj. Rilate periodaĵojn, Slezkine raportas, ke en 1928 jam ekzistis 205 ne-ruslingvaj gazetoj en 47 lingvoj, sed en 1938 ilia nombro kreskis ĝis 2188 en 66 lingvoj. Kolĥozaj, municipaj, distriktaj, teritoriaj, aŭtonom-respublikaj kaj sovet-respublikaj administracioj funkciis en dekoj da lingvoj foje laŭ modelo de rusaj pupoj, en kiu suba nivelo povis ne uzi la lingvon de la supra, sed ekskluzive alian. La rezulto estis, ke la kapabloj legi kaj skribi en la gepatra lingvo estis tre aktive puŝitaj de la aŭtoritatoj. Sensurprize, la anal-

fabeteco disfalis: se en 1897 (en la tuto de la tiama Rusa imperio) legipovuloj estis 24% de la loĝantaro super 8 jaroj, en 1926 ili jam fariĝis 51% kaj en 1939 81%, laŭ oficialaj donitaĵoj.

Tamen komence de la tridekaj jaroj la tajdo ekmalfluis por la sovetiaj etnaj minoritatoj... eĉ pli ol por la rusa plimulto. Tutmonda komunismo estis tute ne antaŭvidebla por longe longa periodo, sekve latinigo de la rusa perdis sian eventualan urĝecon. Plie, se la socialismon oni devis konstrui en nur unu lando, tiam la rusa “nepre” fariĝos tiu prognozita konvergopunkto de lingvoj, des pli ke la rego de komuna lingvo fare de la loĝantaro fariĝos ege utila por la ŝtato – kaj por faciligi la geografian moveblecon de laboristoj kaj kadruloj, kaj por plifortigi ligojn de komuneco inter la multnacia civitanaro. En tiu kunteksto, latinigo perdis sian sencon. Male, indis puŝi al uzado de la cirila alfabeto, en ĝia rusa varianto, ĉar tio helpas al la lernado de la rusa. Krome, dum la dudekaj jaroj, la aŭtoritatoj volis montri, ke la kulturo de sovetiaj minoritatoj disfloris: ekz. la belarusa kaj ukraina estis vaste uzataj en lernejoj, gazetaro, literaturo kaj administrado, dum en Pollando ilia uzo estis malhelpata. Sovetio tiel povis montriĝi alloga por translimaj minoritatoj. Tamen, laŭlonge de la tridekaj jaroj kreskis la timo de panturkismo, panfinnismo kaj de ĉiaj imageblaj kaj ne imageblaj “kvinaj kolonoj”. Turkio fakte estis adoptinta en 1928 skribon tre similan al la tut-tjurka alfabeto kreita por la sovetiaj tjurkaj lingvoj, kaj finugraj sovetiaj inteligencianoj aktive vojaĝadis eksterlanden kaj interŝanĝadis kun finnoj kaj estonoj (kun la subteno de la sovetia

ŝtato dum la dudekaj jaroj). Tio fariĝis ege suspekta por la Granda Lipharulo.

Fakte, en la dua duono de la tridekaj jaroj okazis nova ondo de alfabetaj reformoj (por kelkaj lingvoj, la tria). La celo estis plidistingi iujn lingvojn disde la najbaraj. Tiel, oni ŝanĝis la uzbekan norman lingvon. La nova bazo estis la prononco de Taŝkento, perdinta la vokal-harmonion, ekzistantan en aliaj uzbekaj dialektoj kaj de la najbaraj lingvoj, dum aldoniĝis multe da leksiko de la orienta Fergana regiono. La rezulto estis, ke dum la antaŭa norma uzbeka estis bone komprenebla de la nordaj kaj okcidentaj najbaroj kazahaj, karakalpakaj kaj turkmenaj kaj eventuale povis fariĝi ilia komuna interlingvo, la nova varianto forte deviis de la najbaraj lingvoj. Tamen en tiu reformo, aprobita en 1937, oni daŭre uzis la latinan alfabeton. Ankaŭ la karakalpaka suferis sian trian reformon en 1938, la duan uzantan latinajn literojn.

Dum la latinigado ankoraŭ funkciis, la latin-litera karabarda ciriliĝis jam en 1935–1936. En 1937 estis malfondita TCKNA kaj pluraj el ĝiaj plej elstaraj membroj estis akuzitaj de la plej malverŝajnaj komplotoj. Polivanov estis arestita en aŭgusto kaj mortpafita en januaro 1938. En 1938, inter multaj aliaj lingvoj, oni ciriligis la adigean kaj la kalmukan; kaj en septembro 1939 la azera, kies aktivuloj estis ĉampionintaj la latinigan procezon, fariĝis la unua lingvo de unia respubliko transiranta al la cirila. Entute nur manpleno da lingvoj ne ciriliĝis: la armena, la kartvela, la karela, la jida kaj, post la aneksado de la baltaj landoj, la estona, la latva kaj la litova. Kompreneble, tio ne estis

povinta okazi sen la diversaj ondoj de ŝtata terorismo komenciĝintaj per la kontraŭkulaka kampanjo kaj la terkolektivigo fine de la dudekaj jaroj kaj kulminintaj en la Granda Teroro de 1937–1938. La ciriligo grandparte venis post la kampanjoj disfaliĝintaj la intelektularojn de praktike ĉiuj minoritatoj en Sovetio. La ukraina kazo estas bone konata. Kiel Subtelny resumas: “Laŭ iuj taksoj, 200 el 240 aŭtoroj skribantaj tiutempe en Ukrainio malaperis. El la 85 scienculoj en la kampo de lingvistiko, 62 estis likviditaj”.² Tio okazis per senfino da ŝajnprocesoj, pluraj el kiuj estis vaste diskongitaj de la aŭtoritatoj, kiel kontraŭ elpensita Unio por la Liberigo de Finnaj Naciecoj, en kiu jam en 1933 dudek ok elstaraj finn-ugraj intelektuloj estis akuzitaj pri aparteno al spiona organizaĵo. Ne malpli ol dek mortis ekzekutitaj aŭ en la gulago. Plia ekzemplo el la ĉuvaŝa lingvo: Laŭ la atesto de la verkisto Ŝemyon Elker, naskita en 1894, post 1938 “el la pli maljunaj verkistoj restis nur Ĉaldun, Ivan Muĉi kaj mi”.³

Pro la timo al pliaj persekutadoj, la travivintaj lingvistoj kaj funkciuloj, kiuj devis nepre ciriligi la lingvojn, hastis. Tiel multe, ke tio eĉ kaŭzis ortografiajn malkongruojn inter malsamaj lernejoj lernolibroj. La rapidemo de la postulataj ŝanĝoj, aldone al la timo esti akuzita de naciismo aŭ spionado, igis, ke la novaj ortografioj ankaŭ malkongruis inter si, pliampleksigante la komencitan procezon en la ĵusa dua latinigo de centr-aziaj lingvoj. Ekzemple,

laŭ Borovkov, “la fonetike treege similaj karakalpaka kaj kazaha lingvoj (...) estas tute malsamaj skribe: La alfabetoj en ambaŭ lingvoj estas malsamaj; la ortografia solvo de identaj trajtoj estas plenumata laŭ malsamaj manieroj”.⁴ Plie, almenaŭ pluraj el novaj cirilaj ortografioj, por plisimiliĝi al la rusa, neglektis fonetikajn diferencojn de la koncernaj lingvoj notitajn en antaŭaj ortografioj. Tiel okazis por diversaj tjurkaj centr-aziaj lingvoj. Eĉ por la ĉuvaŝa, kiu estis ĉiam skribita per cirilaj literoj, la reformoj de la tridekaj jaroj aldonis ĉiujn rusajn literojn al la alfabeto, forigis plurajn specifajn al la ĉuvaŝa kaj ŝanĝis la leĝregulojn kaj ortografion de plej elementaj vortoj. Rimarkinde, en Kartvelio la abĥaza kaj la oseta ne estis ciriligitaj, sed devis alpreni en 1938 la kartvelan alfabeton... sed en Nord-Osetio, apartenanta al la Rusia SFSR, la oseta transiris al la cirila. La abĥaza kaj la “sud-oseta” ciriliĝis en 1954, unu jaron post la morto de Stalino.

Malhazarde, la ciriligo okazis praktike samtempe al la enkonduko de la rusa lingvo kiel lernobjekto en la elementaj lernejoj. Eĉ pli: “Baldaŭ establiĝis la regulo, ke ĉiuj vortoj prenitaj el la rusa lingvo devas esti literumitaj precize kiel en la rusa”⁵, eĉ kie oni atendus ian fonologian adaptiĝon. Kaj ke ĉiuj “internaciaj” vortoj devis esti prenitaj laŭ ilia rusa adapto. En vortoj de Sebba: “Tio pavimis

la vojon por amasa importado de rusa vortprovizo, neadaptita, en la tjurkajn lingvojn. Tiutempe, tio estis prezentita kiel utila, helpo por modernigi kaj sovetiigi la koncernajn lingvojn. Fakte, ĉar ĉiu lingvo adaptiĝis malsame al la cirila alfabeto, la rusa vortprovizo fariĝis la ‘komuna kerno’ de ĉi tiuj lingvoj, ĉar tjurkaj parencaj vortoj estis malsame skribitaj eĉ en proksime rilataj lingvoj”.⁶ Preskaŭ ĉiuj latinliterigitaj lingvoj estis ciriligitaj ĝis 1940–1941. Pluraj lingvoj kun “malmultaj” parolantoj simple ĉesis esti skribitaj. La uzado de la lingvoj en lernejoj kaj gazetaro forte malkreskis, ĉefe de la lingvoj kun malplej fortaj demografioj (ĉu en absolutaj kvantoj, ĉu en relativaj, kiam uzataj ekster la kerno de sia lingvoteritorio). En la jida, ekzemple, oni transiris de 668 titoloj eldonitaj en 1932 al nul en 1949. Eldonoj en la romaa plene ĉesis jam en 1939.

De la revoluciaj idealoj de 1917, en la lingva tereno, restis nur ombro. Ne nur la rusa estis denove agnoskata kiel supera al ĉiuj aliaj lingvoj de la lando, sed nun oni inside reformis ilin, por ke iliaj alfabeto kaj leksiko fariĝu kiel eble plej proksimaj al ĝi. Eĉ se per tio oni tordis la fonologion de la lingvoj aŭ eĉ ilia morfologio (ekzemple, paŭsante la rusan, per amasa aldono de adjektivoj). Eĉ la gramatikoj de lingvoj tre malsamaj al rusa ekestis klarigataj surbaze de la rusa gramatiko. Ĉio taŭgis por kiel eble plej glate instrui la rusan, surtronigitan kiel “la duan gepatran lingvon” de ĉiu, kiu ankoraŭ ne havis ĝin kiel sian unuan. ■

2 Subtelny, Orest. *Ukraine: A History*. 4a eld. University of Toronto Press, 2012, p. 419.

3 Elker, Ŝemyon. *Hurapa ŝurā. Těrlě vāhātra šrnisem*. Ĉaŭaŝ kēneke izdatel'stvi, 1994, p. 424.

4 Borovkov, A. K. «K voprosu ob unifikacii tjurkskix alfavitov v SSSR». *Sovetskoe Vostokovedenie* 4, 1956, 101–111. Citita en: Henze, Paul B. «Politics and Alphabets in Inner Asia». En *Advances in the Creation and Revision of Writing Systems*, red. de Joshua A. Fishman. De Gruyter, 1977, p. 388–389.

5 Henze, citita verko, p. 383.

6 Sebba, Mark. «Ideology and Alphabets in the Former USSR». *Language Problems & Language Planning* 30, n-ro 2, 2006, p. 104. <https://doi.org/10.1075/lplp.30.2.02seb>.

EL CASTELLÀ ISLÀMIC ESCRIT AMB L'ALFABET ÀRAB: UN TRET DISTINTIU DE LA CULTURA ISLÀMICA PRÒPIA DELS MUSULMANS DEL REGNE D'ARAGÓ

Xavier Casassas Canals
Islamòleg



Manuscrit B del Poema de Yuçuf.

A l'edat mitjana, a la península Ibèrica, els musulmans no constituïen culturalment un bloc homogeni ni monolític. Tot i compartir una mateixa fe i un mateix llegat islàmic, els musulmans presentaven diferències culturals notables en la manera de viure i d'expressar la seva religió, segons la regió i les circumstàncies polítiques, socials i lingüístiques que definien i marcaven l'horitzó cultural de

les seves vides. Al segle XV, per exemple, podem distingir quatre comunitats musulmanes principals: la del Regne de Granada, la del Regne de Castella, la del Regne d'Aragó i la del Regne de València. La primera gran diferència que hem de tenir en compte és que, mentre les comunitats musulmanes de Castella, Aragó i València vivien en territoris governats per autoritats cristianes, el Regne de Granada continuava

sent un estat islàmic independent. A Granada, des de feia segles, els musulmans vivien la seva religió en plena llibertat compartint el llegat cultural islàmic i la llengua àrab amb els musulmans d'altres regions i països del món on es vivia lliurement i plenament l'islam. Com a qualsevol altra regió del món islàmic, els musulmans de Granada tenien alguns trets culturals propis, però no es diferenciaven de forma substancial

d'altres societats islàmiques. En canvi, als territoris sota domini cristià la situació era força diferent. Tot i que les autoritats cristianes reconeixien la fe islàmica i permetien que els musulmans dels seus territoris la visquessin lliurement tant en l'esfera pública com en la privada —i fins i tot els deixaven organitzar-se i regir-se segons les normes, lleis i criteris de la jurisdicció islàmica—, hi havia certes circumstàncies i restriccions que feien que la vivència de la seva fe es veiés, en determinades situacions, limitada de forma puntual. Aquesta situació de llibertat religiosa es va mantenir durant segles, fins a principis del segle XVI (1502 a la Corona de Castella i 1525 a la Corona d'Aragó) quan les autoritats cristianes van decretar la conversió forçada al cristianisme de tots els musulmans del seus territoris.

Una de les principals diferències que hi havia al segle XV entre les comunitats musulmanes dels regnes de Castella, Aragó i València era la lingüística. Al Regne de València, els musulmans mantingueren com a llengua habitual l'àrab sense que es tinguí constància que hagin utilitzat el romanç¹ de forma majoritària, ni oralment ni per escrit, encara que és evident que hi devia haver individus que feien

de traductors o ponts intermediaris entre la comunitat cristiana i la comunitat islàmica valenciana. Als regnes d'Aragó i Castella, l'ús de la llengua àrab havia anat quedant reduït principalment a l'àmbit institucional, religiós o jurídic. Tot i que encara existia una elit intel·lectual que feia servir l'àrab de manera regular, la majoria dels musulmans, tot i utilitzar-lo en els actes i ritus de devoció religiosa, no dominaven aquesta llengua i la seva llengua habitual era el castellà. Això va propiciar el sorgiment d'una literatura islàmica en llengua castellana, que coexistia amb la redactada en llengua àrab. És per aquest motiu que, a Castella i Aragó, al segle XV podem constatar l'existència simultània d'obres islàmiques en àrab, obres islàmiques en castellà, obres islàmiques bilingües en àrab i castellà, i obres àrabs que inclouen comentaris o gloses en castellà. La producció escrita dels musulmans castellans i aragonesos abraça tots els temes i gèneres habituals de qualsevol societat islàmica. Formen part d'aquesta producció escrita còpies, traduccions i comentaris exegetics de l'Alcorà, així com tractats sobre l'art de la recitació alcorànica; compilacions dels dits i fets de Mahoma; tractats doctrinals i dogmàtics sobre els fonaments de la fe; obres jurídiques (tant de dret civil com religiós); obres d'història sagrada; calendaris lunars amb la relació de festivitats islàmiques, el seu origen i els seus beneficis; obres que exposen l'origen, la forma i el contingut dels diferents ritus i actes de devoció; sermons i recopilacions de sermons; diccionaris de llengua àrab; obres de gramàtica i fonètica àrab; relats de pelegrinatge a la Meca devocionaris; obres místiques; textos escatològics; llibres de consells; obres de medi-

cina o receptaris; obres literàries en prosa i en vers; actes notariais; documents mercantils; contractes matrimonials; tractats sobre dret hereditari; testaments; tractats sobre superstició o màgia, etc.

Al Regne d'Aragó, la major part de la literatura islàmica en llengua castellana s'escribia fent servir l'alfabet àrab. Aquest fet és excepcional a la península Ibèrica, però habitual al món islàmic, on nombroses comunitats amb llengües pròpies diferents de l'àrab, opten, o han optat, per escriure-les amb l'alfabet àrab², com es el cas, per exemple, del turc, el persa, el malai, el wòlof o el uigur.

Si, a més, tenim en compte que els jueus espanyols escrigueren algunes de les seves obres en castellà fent servir l'alfabet hebreu, constatem que, al segle XV, la llengua castellana s'escribia amb tres alfabets diferents (el llatí, l'hebreu i l'àrab), produint-se un cas excepcional de *digrafia*³: l'ús de dos o més sistemes d'escriptura per re-

2 Per a ser més exactes, es tracta d'un alfabet àrab adaptat, igual que són alfabets àrabs adaptats els que fan servir el turc o el persa. Normalment, quan els parlants d'una llengua no àrab adopten l'alfabet àrab per a escriure-la, es troben amb el problema de que hi ha sons de la seva llengua que no tenen cap representació en l'alfabet àrab. Per això, es veuen obligats a modificar o ampliar l'alfabet àrab per a poder representar aquests sons. Per exemple, el castellà, el turc i el persa tenen el so 'p' que no està representat i no existeix en l'alfabet àrab, i han hagut de trobar una manera de poder representar-lo ampliant (el persa i el turc) o adaptant (el castellà) l'alfabet àrab.

3 Vegeu Berlanda, Elena. *New Perspectives on Digraphia: A Framework for the Sociolinguistics of Writing Systems*. Major Research Paper, Graduate Programme in Theoretical and Applied Linguistics, York University, Toronto, 2006.

1 Es conserva, però, un cas excepcional d'obra islàmica escrita en català a València: el *Llibre de la Çuna i Xara dels moros*, un tractat de jurisdicció islàmica redactat a mitjans del segle XV. Ara bé, aquest tractat no era una obra destinada a l'ús intern de la comunitat musulmana, sinó que era una obra adreçada a les autoritats cristianes interessades en conèixer el contingut i funcionament de la jurisdicció islàmica emprada pels seus súbdits musulmans. Vegeu Barceló Torres, Maria del Carmen. *Llibre de la çuna e xara dels moros*, València: Generalitat Valenciana, 1989.

presentar una mateixa llengua. Es tracta d'una *digrafia sincrònica*⁴ —els tres alfabetes s'empraven simultàniament en un mateix període històric— del tipus *out-digrafia*, ja que els tres alfabetes eren completament diferents i no pas variacions d'un mateix alfabet⁵.

Les obres islàmiques escrites en castellà, ja sigui fent servir l'alfabet àrab o el llatí, ens ofereixen un accés més directe a la cultura i al pensament islàmic, ja que eviten la dificultat de traduir els textos àrabs originals per poder-los entendre. Els intellectuals i autors musulmans castellans i aragonesos van realitzar un gran esforç per traspassar la concepció islàmica del món expressada en llengua àrab al marc de la llengua castellana, una tasca molt difícil per diversos motius, entre els quals destaquen dos principals: primer, gran part del vocabulari castellà estava fortament impregnat de significats propis del dogma i del

pensament cristià; segon, molts conceptes o termes àrabs-islàmics eren difícils d'expressar en castellà a causa de la manca de termes o conceptes equivalents en aquesta llengua. Per aquest motiu, el castellà, a part de ser escrit amb l'alfabet àrab es va islamitzar també a nivell lèxic i sintàctic. Per exemple, quan un autor musulmà menciona els àngels en un text escrit en castellà, en comptes de fer servir la paraula castellana *àngel* normalment fa servir la forma castellanitzada de la paraula àrab *malak* (ملك *àngel*), és a dir, *malake*. Això ho fa perquè el concepte d'àngel és en part diferent en el cristianisme i en l'islam, i utilitzant la paraula *malake* es vol evitar que pugui suggerir alguna relació amb conceptes o atributs referits als àngels que no es corresponen amb els que els atorga el dogma i la tradició islàmics. És per això que els textos escrits en castellà pels musulmans castellans i aragonesos tenen, a primera vista, per al lector no acostumat a llegir-los, un aspecte exòtic i singular, ja que sovint inclouen paraules àrabs o paraules àrabs castellanitzades.

A continuació, oferim la transliteració d'un text escrit en castellà fent servir l'alfabet àrab. El

lector podrà observar que no és fàcil de llegir. El motiu és que, a més de les dificultats pròpies del castellà del segle XV, s'ha de tenir en compte la presència d'aragonesismes i catalanismes, així com algunes paraules àrabs adaptades que han estat sotmeses a una castellanització; a més, s'han de tenir en consideració alguns conceptes teològics o dogmàtics que no estan expressats de forma explícita en el text, però que per al lector o l'oient musulmà són més o menys clars i evidents de forma implícita. Donem la transliteració del text seguida d'una versió moderna del seu contingut. El text és una traducció al castellà d'un text dogmàtic de caire filosòfic escrit pel fundador de la dinastia Almohade, Ibn Tumart (m. 1130), anomenat *La Murxida*, que va ser àmpliament difós i conegut entre els musulmans del Regne d'Aragó⁶.

4 Es a dir, que els tres alfabetes es fan servir a la mateixa època. Altres llengües en les que s'ha donat o es dona el fenomen de la digrafia sincrònica són, per exemple, el polonès, el kurd o el panjabi.

5 En el cas que es tractés de variacions d'un mateix alfabet, parlariem d'una *in-digrafia*.

6 Aquesta traducció de *La Murxida* forma part del manuscrit J-41 de la Biblioteca Tomás Navarro Tomás del CSIC (Madrid). Veure Casassas Canals, Xavier. "Difusión de copias y traducciones de la 'aqida 'al-Muršida' de Ibn Tūmart entre los musulmanes españoles (ss. XV-XVII). Fijación del texto y materiales para su estudio." a *Īrfān*, núm. 4, 2018, pp. 147-173.

BIBLIOGRAFIA

Casassas Canals, Xavier, "La literatura islámica castellana: siglos XIII-XVII. Catálogo de textos mudéjares y moriscos escritos en caracteres latinos", *Al-Andalus-Maghreb*, 16 (2009), pp. 89-113.

Casassas Canals, Xavier, "La literatura aljamiado-morisca en el marco de la literatura islámica española: siglos XIII-XVII (una

variedad del castellano vinculada al hiero-sprachbund islámico)", en Benlabbah, Fatiha y Chalkha, Achouak. (Eds.), *Los moriscos y su legado desde ésta y otras laderas*, Rabat, 2010, pp. 368-396.

Casassas Canals, Xavier, "Difusión de copias y traducciones de la 'aqida "al-Murshida" de Ibn Tūmart entre los musulmanes españoles (ss. XV-XVII). Fijación

del texto y materiales para su estudio", *Al Īrfān*, 4 (2018), 165-178.

Casassas Canals, Xavier, "Las 'aqida-s entre los musulmanes castellanos y aragoneses de época mudéjar y morisca: las 'aqida-s de Ibn Abi Zayd Al-Qayrawani (s. X), Ibn Tumart (s. XII) e Isa de Jebir (s. XV)", *Espacio, Tiempo y Forma*, 33 (2020), 97-116.

Transliteració:

Sab! -adrecenos Allah- ya tu! Que ello es que conviene sobre todo costreñido en que sepa que Allah el Honrado y el Noble es uno en su reismo. Formó el mundo de todo punto, lo alto y lo bajo, y el alarche y el alkursi⁷, y los samaes⁸ y la tierra, y lo que en ellos y lo que entre ellos. Todos los formados son formados a su potestat. No se mueve ala de formiga sin su licencia, no ha con El regidor en los criados, y no a parsunero (aparcero) en el reismo. Vivo mantenible, no lo prende sueño ni dormir. Sabidor de lo absente y de lo público, no se le encubre sobre El cosa en la tierra ni en los cielos. Sabe lo que i a en la tierra y en la mar, y no se cae fuella que no lo sepa, ni grano en la escuridad de la tierra, ni verde, nie seco, que no sea en su saber declarado. Comprende con toda cosa su saber y comprende toda cosa de número. Facedor de lo que quiere, poderoso sobre lo que quiere. A El i a el reismo y la riqueza y a El i a la honra y la fincanza. Y a El i a el juicio y la ordenación, y a El i a la loación y el loamiento, y a El i a los nombres fermosos. No a defensor a lo que a judgado, ni i a defensor a lo que a dado. Face en su reismo lo que quiere, y judga en sus criados lo que quiere. No a esperanza a walardón, ni a miedo a tormento. No a sobre El dereitage, ni a sobre El juicio, pues a toda gracia de El es vantalla y toda venganza de El es justicia. No le será demandado de aquello que face. Y a ellos les sera demandado. Fue trobado ante del formamiento. No a El ante ni después, ni sobre El, ni jus de El, ni a man derecha, ni a man esquerra, ni delante de El, ni saga de El, ni todo, ni part. No puede ser dito ni cuando fue, ni do es, ni como es, fue; y no abia lugar, engendro el lugar, y ordenó el tiempo. No lo pueden especialar con tiempo, ni lo pueden abarcar con lugar. No lo acosiga estimación; y no lo pueden decir como e el seso, [no] pueden especialar en el entendimiento; no lo pueden semblanzar en el anima; ni lo pueden figurar en la estimación; nol pueden decir como es en el entendimiento; no lo acosigan las estimaciones ni los piensos. Y El es el Oidor. Y sabe lo que i a en los corazones.

Versió del text en castellà modern:

Has de saber —guíenos Dios por la recta vía— oh, Tú! Que es conveniente para toda persona adulta y por tanto responsable ante la Ley, que sepa que Dios, el Honrado y el Noble, es uno en su reino. Formó la totalidad del mundo: lo alto, lo bajo, el *Alarche* (el trono), el *Kursí* (el sitial), los *samaes* (cielos) y la tierra, lo que hay en ellos y lo que hay entre ellos. Todos los seres creados han sido formados por su poder. No se mueve ala de hormiga sin su licencia. No tiene ningún otro que rija con Él los seres creados. No tiene asociado en su reino. Él es el Vivo, el Subsistente, no le toma el sueño ni el dormir. Sabedor de lo ausente y de lo presente, no se le encubre ninguna cosa ni en la tierra ni en los cielos. Sabe lo que hay en la tierra y en el mar. Y no se cae hoja que no lo sepa, ni grano en la oscuridad de la tierra, ni verde, ni seco, que no sea declarado en su saber. Su saber comprende todas las cosas y su número. Hace lo que quiere, poderoso para lo que quiere. A Él pertenecen el reino y la riqueza. A Él pertenecen la honra y la permanencia. A Él pertenecen el juzgar y el ordenar, y a Él pertenecen la loa y la alabanza, y a Él pertenecen los Nombres Hermosos. No hay defensor contra lo que él juzga, ni hay defensor contra lo que Él da. En su reino hace lo que quiere, y juzga lo que quiere sobre sus criaturas. No tiene esperanza de galardón, ni miedo al tormento. No hay sobre Él ninguna potestad, ni ningún juicio. Toda gracia que proviene de Él es ventaja y toda venganza que proviene de Él es justicia. No será juzgado por lo que hace, y ellos sí que serán juzgados. Era antes del momento de la creación. No hay para Él un antes ni un después; ni sobre Él, ni debajo de Él, ni a su mano derecha, ni a su mano izquierda, ni delante de Él, ni detrás de Él. No es todo ni parte. No se puede decir ni cuándo fue, ni dónde es, ni cómo es. No había espacio y Él engendró el espacio y ordenó el tiempo. No se le puede limitar en el tiempo, ni se le puede confinar en un espacio. No lo puede aprehender la estimativa, ni puede decir cómo es la razón, no se le puede abarcar con el entendimiento, ni se le puede asemejar a nada en el ánima⁹. No se lo puede imaginar la estimativa. No puede decir cómo es el entendimiento, no lo abarcan ni las estimaciones ni los pensamientos. Él es el Oidor y sabe todo lo que hay en los corazones. ■

7 *Al-‘arx* (العرش el tron) i *al-kursí* (الكرسي el sitial) son dos conceptes de la teologia islàmica.

8 *Samaes* es la castellanització, en forma de plural, de la paraula àrab *samā’* (سَمَا), que significa cel.

9 Ni el ánima puede llegar a considerar que haya nada semejante a Él.

BOSNA LINGVO

Selma Zvirac

Profesorino pri bosna, kroata kaj serba lingvoj
Estrarano de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino



La bosna lingvo estas aŭtoktona kaj originala fenomeno.

Dum sia longa historio, la bosna lingvo estis skribita per kvin diversaj skribsistemoj: glagolico (malnovslava alfabeto), cirila skribo, bosna glagolico (bosne *bosančica*), araba skribo – arabico (bos. *arebica*) kaj latina skribo (bos. *latinica*).

Bosnio kaj Hercegovino (BkH) estas ŝtato en sud-orienta Eŭropo. Ĝi havas limon kun Kroatio, Serbio kaj Montenegro. Ĝia ŝtat-administrada strukturo estas aparte kompleksa: ĝi konsistas el du entoj (la Federacio de BkH kaj la Respubliko Srpska) kaj la distrikto Brčko. Laŭ la censo de 2013, en Bosnio kaj Hercegovino vivis 3 513 159 loĝantoj. La bosnia popolo estas dividita en tri etnajn grupojn: bosnoj – 50,11% de la loĝantaro, bosnaj serboj – 30,78%, bosnaj kroatoj – 15,43%, kaj aliaj – 2,73%.

La oficialaj lingvoj estas la bosna, serba kaj kroata.

La bosna lingvo apartenas al la sudslavaj lingvoj, kiuj estas subgrupo de la slava lingvogrupo kiu apartenas al la granda hindeŭropa lingva familio.

La hindeŭropa lingva familio – inkluzive de la hindoiranaj, romanaj, baltaj, keltaj kaj slavaj lingvaj grupoj kune kun la albana kaj greka – disiĝis ĉirkaŭ la jaro 2000 a.n.e., kaj tiam formiĝis la balt-slovena lingva komunumo.

Ankaŭ tiu ĉi lingva komunumo disfalis inter 1500 kaj 1300 a.n.e., kio kondukis al la formiĝo de la praslava lingva komunumo.

Oni supozas, ke la malnovaj slavoj vivis sur teritorio inter la riveroj Odra kaj Laba okcidente kaj la rivero Volga oriente. La praslava lingvo estis uzata proksimume ĝis la 3a jarcento p.K., kiam komenciĝis la migradoj de la slavo. Post tiuj migradoj, tra kelkaj jarcentoj, formiĝis tri ĉefaj grupoj de slavaj dialektoj: okcidentaslava, orientaslava kaj sudaslava. El tiuj ĉi dialektoj disvolviĝis la nuntempaj slavaj lingvoj:

- Okcidentoslavaj: pola, ĉeĥa, slovaka, kaŝuba (norda Pollando), malsupra soraba kaj supra soraba.
- Orientoslavaj: rusa, belorusa, ukraina kaj rusina (rutenia).
- Sudslavaj: dividitaj en okcidentan branĉon (slovena kaj la mez-sudaslava diasistemo) kaj orientan branĉon (makedona, bulgara kaj la malnovaslava lingvo).

La sudslavaj lingvoj devenis el la sud-slava pralingvo, kiun parolis la prauloj de la sudaj slavo antaŭ ilia alveno en la Balkanon en la 6a kaj 7a jarcentoj. Post la aligrado, la slavo ekloĝis inter la Orienta Romia Imperio (Bizanco) kaj la Okcidenta Romia Imperio, troviĝinte inter la grekaj kaj latinaj kulturoj kaj skribsistemoj.

La malnovaslava lingvo estas la unua skriba lingvo de la slavaj popoloj. Ĝia kreinto estis la slava kleriko kaj misiisto Konstantino (Cirilo) en la dua duono de la 9a jarcento. La fratoj Cirilo kaj Metodjo tradukis ekleziajn librojn en la malnovslavan lingvon.

La plej malnovaj tekstoj en malnovaslava lingvo uzita en malnova Bosnio kaj Humo (bos. *Hum* estas malnova nomo por nuna Hercegovino) ne

konserviĝis – ekzistas nur transskriboj el la 10a kaj 11a jarcentoj. Ili estas skribitaj en glagolico, la skribsistemo kiun poste anstataŭis la bosna glagolico (*bosanĉica*), kiu tamen estis sub forta influo de pli frua glagolica skribo.

La malnovaslava lingvo servis al ĉiuj slavo kiel supernacia kaj super-regiona lingvo, kaj laŭ siaj trajtoj ĝi ne kongruis kun ajna vivanta popola slava lingvo de tiu epoko. Kun la tempo, ĝi komencis adaptiĝi al lokaj medioj, rezultigante diversajn redakciojn de la malnovaslava lingvo: la kroatan, serban, bosnan-human, bulgaran, makedonan, rusan kaj ĉeĥan. Tiel, la bosna lingvo devenas el la bosna-huma redakcio, respektive el unu el la plej fruaj versioj de la malnovaslava lingvo.

En la jaro 863, Cirilo kreis la unuan slavan skribsistemon – la **glagolicon** (malnovslave: *glagoljati*, signifanta "paroli", "skribi"). Baldaŭ poste aperis la cirila skribo (**cirilico**), rare nomata laŭ Cirilo, ĉar oni supozis ke li estis ĝia aŭtoro. Verdire, ambaŭ literumoj estas derivitaj de la greka alfabeto.

Do la malnovaslava lingvo uzis du skribsistemojn: la pli malnovan glagolicon kaj la pli novan cirilan skribon (cirilicon).

En mezepoka Bosnio oni uzis la tiel nomatan bosnan glagolicon.

Tamen, la fonetiko de la slavaj lingvoj postulis novajn kaj originalajn literojn, kiuj ne ekzistis en la greka alfabeto.

Bosnio, jam ekde sia komenco, estis eksponita al diversaj influoj. Ĝi situis ĉe vojkruciĝoj de eŭropaj kaj ekster-eŭropaj civilizacioj, religioj kaj ŝtatoj. Tiu ĉi situo ankaŭ kaŭzis fruajn komencojn de literadumado. La unuaj skribaj verkoj sur monumentoj en la bosna-huma tero devenas de la

”

Dum sia longa historio, la bosna lingvo estis skribita per kvin diversaj skribsistemoj

”

Dum la kvar jarcentoj de regado de la Otomana Imperio, la skriba tradicio disvolviĝis laŭ tri ĉefaj formoj: skriba aktiveco en la popola lingvo, verkado en la turka, araba kaj persa lingvoj kaj alĥamiado-literaturo

”

Inter la 15a kaj 18a jarcentoj okazis etnokonfesia diferencigo, kiu formis tri etnokonfesiajn grupojn: islaman, katolikan kaj ortodoksan

Bosančica – bosna cirila skribo

La glagolico estis ĉefe eklezia skribsistemo, tiel ke kun la falo de Bosnio kaj ĝia eklezio, ĝi eliris el uzo (estis maldaŭrigita). La plej malnova spuro de skribado en glagolico estas surskribo en preĝejo en la vilaĝo Kijevci apud la urbo Prijedor, datita al la 11a jarcento.

La plej malnova ekzemplo de la bosna cirila skribo estas la Tabulo de Humac (*Humačka ploča*) – trovita en la vilaĝo Humac apud Ljubuški – sur kiu aperas ankaŭ kelkaj glagolicaj literoj.

Latinica kaj arebica

Dum la kvar jarcentoj de regado de la Otomana Imperio (Osmanida), la skriba tradicio en Bosnio kaj Hercegovino disvolviĝis laŭ tri ĉefaj formoj:

- La katolika grupo kreis skriban tekstaron en la bosna cirila skribo (*bosančica*) kaj en la latina skribo. La lingvoj de la tekstoj estis popolaj (slovena, bosna, kroata, iliria, dalmatina) kaj la latina. La ĉefa

portanto de skriboscio kaj literaturo estis la Franciskana ordeno. La enhavo estis ĉefe liturgia: predikoj, meslibroj, popol-edukaj tekstoj, bibliaj rakontoj kaj religiaj polemikoj. Alia granda parto de la tekstaro rilatis al aliaj kampoj: historiografio, loka eklezia historio, religia poezio, filologio kaj medicino. Gramatikoj kaj vortaroj estis ĉefe plurlingvaj, ekzemple: bosna-turka, kroata-latina-itala, ktp. La centroj de tiu skriba literaturo estis monaĥejoj kaj urboj kun katolika loĝantaro. Tekstoj plejofte estis presitaj en Venecio. Tiu stato daŭris ĝis la Iliria movado kaj la epoko de Ljudevit Gaj (kroata filologo), kiam katolikoj, pere de la franciskanoj, aliĝis al ĝenerala nacia releviĝo meze de la 19a jarcento kaj akceptis modifitan latinan alfabeton kaj normigitan kroatan lingvon.

La ortodoksa grupo kreis skriban tekstaron en la eklezia slava lingvo. La ortodoksa grupo komencis literaturan produktadon ĉirkaŭ la jaro 1500 en la monaĥejoj. La cirila skribsistemo formiĝis en Serbio, kie la lingvo estis nomata serba aŭ, malofte, slavo-serba. Temis pri la serba redakcio de la eklezia slava, respektive la malnovslava lingvo. La tekstoj havis liturgian karakteron. Tiu situacio daŭris ĝis la mezo de la 19a jarcento, kiam la influo de la lingva reformo de Vuk Karadžić kreskis, kaj ortodoksuloj en la dua duono de la 19a jarcento akceptis normigitan serban lingvon skribitan per lia reformita cirila alfabeto.

La muzulmana etno-konfesia grupo kreis skriban tekstaron en la popola lingvo, plejparte verkita per modifita araba skribo (arebico). La unuaj tekstoj de alĥamidado-literaturo aperis en 1589 kaj tia speco verkado daŭris ĝis la

18a jarcento. La lingvo de la alĥamidado-literaturo estis popola, enhavante malgrandan parton de turk- kaj arablingvaj vortoj. La verkoj temis pri am-poemoj, mistikaj kaj religiaj versoj, same kiel politikaj-polemikaj kaj edukaj tekstoj. La lingvo estis la bosna.

Tekstoj en la bosna cirila skribo estis ĉefe uzataj por diplomatia kaj komerca korespondado.

Ekzistis abunda kreaĵaro en orientaj lingvoj, precipe en la turka kaj araba, kiu kovris ĉiujn kampojn de la islamaj sciencoj: teologio, juro, medicino, astronomio, alkemio, matematiko, filozofio kaj farmakologio. Muzulmanoj, pro diversaj historiaj kondiĉoj, pli malfrue aliĝis al la religia-nacia renesanco en la 19a jarcento.

La seninterrompa uzo de la bosna lingvo en literatura kreado spegulas riĉan popolan verkadon: epiko-lirikaj kaj popolaj kantoj, rakontoj, proverboj, fabeloj, anekdotoj kaj lulkantoj. Ĉi tio montras la ligan kun la naskiĝlando, malgraŭ fortaj influoj de la orientaj lingvoj. La bosna lingvo origine estis integrita en la grafika tradicio (*bosančica*, bosna cirila skribo), sed ankaŭ en la novaj uzoj de la araba grafika sistemo (arebico). Dum ĉiuj ĉi tiuj tempoj, la konscio pri aparteno al la bosna lingvo neniam estis perdit.

La serba filologo Vuk Karaĝić (Karadžić) en la unua duono de la 19a jarcento reformis la cirilan skribon (cirilico), tiel ke ĉiu litero prezentas unu sonon. Laŭ la unuaj du literoj de la cirila alfabeto (*az*, *buki*), ĝi nomiĝis azbuko.

Fine de la 19a jarcento, ankaŭ popolaj kantoj el Bosnio

kaj Hercegovino estis publikigitaj en la reformita cirilico de Vuk Karaĝić. Dum pli larĝaj renaskiĝoj en la suda slava areo, la bosna lingvo komencis esti menciita en diversaj kuntekstoj kaj kiel parto de pli larĝa nomado de sudslavaj lingvoj. Kiel rezulto de ĉiuj tiuj okazintaĵoj, la 28an de marto 1850 en Vieno oni atingis Verkistan (Literaturan) Interkonsenton (bos. *Književni dogovor*) kun partopreno de kvin verkistoj el Kroatio, du el Serbio kaj unu el Slovenio, kiel esprimo de ilia kredo ke ekzistas unu sudslava popolo kiu devas havi ununuran lingvon por literaturo. En la konkludo de tiu interkonsento estis deklarite ke kiel bazo de komuna lingvo oni devas uzi parolon en regiono Hercegovina kaj ŝtokava-ijekava dialekto kiel literatura. Tamen, en ĝi ne estis menciita, ke Bosnio estas fundamento de tiu parolo kaj tiu dialekta bazo. La bosna lingvo estis nenie menciita, ĉar la Verkista interkonsento estis mallarĝa formo de la politika interkonsento inter Serbio kaj Kroatio. La bosnia tradicio estis silente ignorita, preterlasita kaj neglektita. La sama sinteno daŭris ankaŭ en la Interkonsento de Novi Sad en 1954 (bos. *Novosadski dogovor* 1954), kiun subskribis serbaj, kroataj, parte montenegraj kaj bosnaj lingvistoj kaj verkistoj. Tiam ili establis la lingvon serbokroatan-kroatserban, kaj la historia nomo "bosna lingvo" denove estis forigita el lingva uzo.

La retiriĝo de la Otomana Imperio (Osmanida) kaj la alveno de la Aŭstrio-Hungara Imperio en Bosnion kaj Hercegovinon (en 1878) markis gravan momenton de ŝanĝo kaj ankaŭ interrompon

de la skriba aktiveco en la popola lingvo kaj en la cirila skribo reformita de Vuk Karaĝić. Tamen, malgraŭ ĉio, la arebico restis en uzo, dum la bosna cirila skribo (*bosančica*) malaperis. Fakte, la arebico estis uzata en islamaj religiaj lernejoj.

Fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcento aperis fortaj tendencoj enkonduki la gepatran lingvon en religiaj lernejoj. La bosna lingvo eniris la instruon programon en 1884, kaj infanlibroj skribitaj per la arebico en la bosna lingvo komencis esti presitaj. Tia praktiko daŭris ĝis la fino de la aŭstro-hungara regado, ĝis la enkonduko de ne-araba skribo kaj la bosna popola lingvo en lernejoj, en la jaro 1913.

La oficiala gazeto "Bosna" (Bosnio) por legado rekomendis *Bosanski vjestnik* ("La bosna heroldo"), kiu, laŭ ĝia informo, aperis en la bosna lingvo kaj ankaŭ en la turka. Tekstoj en la bosna lingvo, skribitaj per la cirila alfabeto, estis celitaj al kristanoj kaj aliaj bosnianoj, kiuj pro tradicio sciopovis legi la cirilan skribon.

Fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcento aperis ankaŭ la unua generacio de verkistoj, kiuj verkis en la gepatra lingvo per latina skribo. Tiu generacio daŭrigis la lingvan reformon kaj turnis sin al Eŭropo. Multaj libroj skribitaj per latina skribo ebligis pli facilan akcepton de tiu alfabeto.

Tiutempe fondiĝis revuoj kaj gazetoj kiuj kunvenigis ĉiam pli nombran legantaron. En 1891 aperis *Bošnjak* ("Bosniano"), la unua revuo en la bosna lingvo, presita per latina skribo. En ĝi, la termino "bosna lingvo" estis uzata por la gepatra lingvo.

Dum la periodo de aŭstro-hungara regado, la nomo "bosna lingvo" fariĝis la oficiala nomo de la lingvo en Bosnio kaj Hercegovino.

En Bosnio, glagolico estis plejparte anstataŭigita per cirila skribo jam en la 13a jarcento. Fine de la 17a jarcento, ĉiuj en Bosnio uzis la cirilan skribon (cirilicon), ĝis kiam katolikoj komencis uzi la latinan skribon, kiu fine de la 18a jarcento fariĝis domina inter ili.

Jam estis menciita, ke post la alveno de Aŭstrio-Hungario al Bosnio kaj Hercegovino (en 1878), la ĉefa alfabeto daŭre estis la latina, kiu en postaj periodoj karakterizis la bosnan skribkulturon, kompreneble kune kun la akceptita cirila skribo, kiu daŭrigis la tradicion de la bosna cirila skribo (*bosančica*).

En Bosnio, kiel en la plej fruaj tempoj de ĝia kulturo kaj skribopovo, la latina skribo estis adaptita al la bezonoj de la bosna lingvo. La termino *latinica* devenas de la latina vorto *latinus*, kiu signifas "ano de antikva popolo, iam loĝinta en la regiono Lacio", kaj ĝi indikas la latinan alfabeton.

La disvastiĝo de la latina skribo devenis de la ekspansio de la Romia Imperio kaj la dominado de la civilizaj atingoj de la antikvaj Latinidoj. La evoluo de la latina skribo kaj la apero de naciaj alfabetoj bazitaj sur ĝi estis influitaj de diversaj faktoroj, kiel skribteknikoj kaj skribmaterialoj.

La bosna latina skribo estas alfabeto bazita sur la latina alfabeto. La bosnoj jam en la plej frua periodo de sia skribkulturo akceptis la latinan skribon, kiu, kune kun la latina lingvo, servis por skribaj bezonoj de la tiam socio

Аа	Бб	Вв	Гг	Дд	Ђђ	Ее	Жж	Зз	Ии	Јј
Aa	Bb	Vv	Gg	Dd	Đđ	Ee	Žž	Zz	Ii	Jj
Кк	Лл	Љљ	Мм	Нн	Њњ	Оо	Пп	Рр		
Kk	Ll	LJlj	Mm	Nn	NJnj	Oo	Pp	Rr		
Сс	Тт	Ћћ	Уу	Фф	Хх	Цц	Чч	Џџ	Шш	
Ss	Tt	Ćć	Uu	Ff	Hh	Cc	Čč	DŽdž	Šš	

Unua linio – cirila skribo,
dua linio – latina skribo

kaj por rilatoj kun la najbaraj okcidentaj regionoj. La latina skribo en Bosnio evoluis laŭ specifa vojo kaj travivis multajn ŝanĝojn. Komence, certaj sonoj estis esprimataj per diversaj manieroj (ekz. digrafoj), laŭ la modeloj de aliaj lingvoj (itala, germana, hungara)... kaj poste, per difino de apartaj literformoj, oni establis la literojn: nj, lj, dž, đ, ĉ, é, š, ž, kiuj estas uzataj ĝis hodiaŭ. La latina skribo estas karakteriza trajto de la moderna bosna lingvo. Tiu skribo plej bone reflektas ĝiajn gramatikajn trajtojn kaj ĝian orientiĝon al la okcidenta skriba tradicio.

En Bosnio kaj Hercegovino ankaŭ hodiaŭ estas uzataj du alfabetoj – la latina kaj la cirila, kio estas bonŝanco kaj privilegio, kaj neniel ŝarĝo.

FONTOJ:

Halilović, Senahid, *Bosanski jezik*, 1991.

Halilović, Senahid, *Bosanski jezik*, 1998.

Jahić, Halilović, Palić, *Gramatika bosanskoga jezika*, 2000.

Jahić, Dževad, *Bosanski jezik u 100 pitanja i 100 odgovora*.

Letić, Dobrila, *Srpski jezik i kultura izražavanja*, 1999. ■

ESPERANTO KAJ LA JAPANA LINGVO – EL LA VIDPUNKTO DE LA MEDIALO

Isikawa Takasi

Japana esperantisto. Ŝatanto pri komparo de lingvoj



Al multaj eŭropanoj la japana lingvo povas ŝajni tre fremda kaj malfacila. La japana skrib-sistemo, kiu havas kvar signojn (ĉinaj literoj, rondaj kanaoj, strekaj kanaoj, latinaj literoj) estas probable granda baraĵo por lernontoj. Ankaŭ komplika esprimaro pri respekto kaj mildeco povus esti alia terurigilo. Aparte de la ĉi-supraj trajtoj la japana havas simplan fonetikon kaj relative regulan gramatikon.

La japana lingvo havas neniajn parencajn rilatojn kun hindeŭropaj lingvoj. Sed, por eŭropaj esperantistoj verŝajne la plej mirinda trajto de la

japana lingvo estas, ke ĝi havas similan verboforman sistemon de la medialo (mediala voĉo, meza voĉo, medium) samkiel Esperanto. Kvankam la plimulto de japanoj kaj esperantistoj ne konas la gramatikan terminon medialo, ili senkonscie uzadas medialajn verbojn en ĉiutaga konversacio kaj skribado.

Tiu ĉi artikolo celas restitui medialon, kiu malgraŭ granda rolo en Esperanto kaj la japana estas longe ignorata kaj miskomprenata en esperantujo kaj Japanio, kaj plue montri la signifon de la ŝanĝiĝo de la medialo en la historio de homaj lingvoj.

”

Por eŭropaj esperantistoj verŝajne la plej mirinda trajto de la japana lingvo estas, ke ĝi havas similan verboforman sistemon de la medialo samkiel Esperanto

KIO ESTAS MEDIALO? – KONKRETAJ EKZEMPLOJ

Ni vidu aktualajn ekzemplojn de kelkaj paroj de frazoj ambaŭlingvaj, kiuj havas saman signifon. Kursivita vorto signifas medialan verbon.

1)-e De la ponto Mt.Fuĵi *vidiĝas*.

1)-j Hasi kara Huzi-san ga *mieru*.

2)-e Pepado de birdetoj *aŭdiĝas*.

2)-j Kotori no saezuri ga *kikoeru*.

3)-e La glaso *rompiĝis*.

3)-j Koppu ga *wareta*.

4)-e La papero *perdiĝis*.

4)-j Kami ga *nakunatta*.

5)-e La fajro *estingiĝis*.

5)-j Hi ga *kieta*.

6)-e Nun *kreiĝis* novaj situacioj por la esperanta movado.

6)-j Imaya esuperanto undo ni atarasii zyokyo ga syozita.

Tiuj verboj en la supraj dulingvaj frazoj paralele ŝanĝiĝas al tri gramatikaj voĉoj: aktiva, pasiva kaj mediala.

	aktivo	pasivo	medialo
1)'-e vidi	esti vidita	<i>vidi-ĝi</i>	
1)'-j miru	mirareru	<i>mie-ru</i>	
2)'-e aŭdi	esti aŭdita	<i>aŭdi-ĝi</i>	
2)'-j kiku	kikareru	<i>kikoe-ru</i>	
3)'-e rompi	esti rompita	<i>rompi-ĝi</i>	
3)'-j waru	warareru	<i>ware-ru</i>	

Multaj aliaj verboj en ambaŭ lingvoj sammaniere faras ŝanĝon en tri voĉoj, sed kompreneble ne ĉiu esperanta mediala verbo havas korespondan verbon en la japana.

Ĝis nun mi montris kelkajn ekzemplojn de la funkcio de medialaj verboj sen doni la difinon pri ĝi. Nun, mi prezentu mian hipotezan difinon komparante kun tiu de la aktivo.

Medialo esprimas aferon aŭ fenomenon: io okazas al iu, dum aktivo esprimas agon: iu faras ion.

6)-e Taro laboris en Tokio.

- aktivo

7)-e Taro **naskiĝis** en Tokio.

- medialo

Ambaŭ 6)-e kaj 7)-e estas simile simplaj frazoj kun subjekto, netransitiva verbo kaj komplemento. Tamen, la funkcioj de la du subjektoj estas tute malsamaj. En 6)-e Taro estas aganto, kiu intence faras laboron, dum en 7)-e Taro ne estas aganto aŭ kaŭzanto, kaj ne regas la verbon, *naskiĝi*. Estiĝis, ke Taro aperis en la mondon tute senrilate al sia volo kaj ago. Fakte, Taro estas la gramatika subjekto, sed la reala aganto kaŝiĝas post la kulisoj.

La medialo ne temas pri agado de subjekto, sed pri okazanta afero aŭ estiĝanta ŝanĝo de la stato pri la subjekto. Alivorte, en mediala frazo la subjekto ne indikas aganton, sed indikas la lokon aŭ sidejon, kie estiĝas afero aŭ procezo kiu influas aŭ koncernas la subjekton. Kaŝita aganto povas esti iu alia persono, natura forto, aŭ iuspeca potenco.

KIO ESTAS MEDIALO? - TRADICIA KLARIGO

Verdire, la ĉi-supre prezentita defino kaj argumento rekte staras kontraŭ tiu de la tradicia, ĝenarale akceptata teorio pri la medialo.

La plej aŭtoritata gramatika libro, *plena analiza gramatiko de esper-*

anto (PAG) de Kalocsay kaj Waringhien difinas ĝin jene:

La mediala voĉo, esprimata per iĝi, unuigas en si propre la aktivan kaj la pasivan: la subjekto estas samtempe ankaŭ la objekto de la ago: ĝi faras la agon pri si mem (p.166).

Aliaj gramatikistoj de Esperanto, kiel André Cherpillod kaj Mirosław Malovec, probable sub la rekta influo de PAG, prezentas la saman teorion pri ĝi. Bertilo Wennergren en sia *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG), ne uzante la terminon; mediala voĉo aŭ medialo indikas medialajn verbojn per “IĜ-verboj faritaj el objektaĵaj verboj”. Sed lia klarigo estas preskaŭ sama kiel tiu de PAG.

Ni vidu ĉi tie, ĉu ilia klarigo sufiĉe eksplikas ĝian formon kaj funkcion. Ĉu la subjektoj en 1)-e, 2)-e, 3)-e, 4)-e, 5)-e kaj 6)-e estas agantoj kaj samtempe objektoj de la verboj? Tute ne. Aliflanke, PAG ofte traktas la frazon “la ŝtono ruliĝis” kiel tipan ekzemplon de la medialo. Laŭ PAG la medialo esprimas agon faratan sen decido de konscia volo, kontraste al la vole faritan agon esprimatan en la refleksiva voĉo, kiel “la ŝtono sin rulis”. Estas fakto, ke oni fojfoje prozopopee esprimas senvivaĵon kvazaŭ vivantan aganton, sed laŭ PAG senvivaĵoj, ec se senkonscie, faras movon kaj samtempe fariĝas agatoj. Bedaŭrinde, ilia teorio tute ne klarigas la funkciojn de ĉiu ekzemplo de mediala frazo montrita supre.

Tiuj teorioj de la esperantistaj gramatikistoj baziĝas sur la lingvistikaj studoj kaj esploroj, kiuj estis longe faritaj por klarigi la naturon kaj funkcion de la medialo en antikvaj lingvoj, precipe en la sanskrito kaj la helena. Tiuj

lingvistoj ne sukcesis klarigi la esencon kaj funkcion de la medialo, ĉar ili estis tro obsedata de subjektecio. Laŭ ili, kie troviĝas subjekto, ĝi devas esti aganto.

Ni flugrigardis kaj iom komprenis la naturon de medialo, sed la ekzemploj montritaj estis simplaj esprimoj, por ke la gramatika strukturo estu simpla kaj klara. Medialaj esprimoj troviĝas ne nur en ĉiutagaj skribaĵoj aŭ konversacioj sed ankaŭ en skribaĵoj pri kompleksaj kaj abstraktaj temoj. Ni citu kelkajn frazojn el U. Lins, *La Danĝera Lingvo*:

En la jaroj 1931/32 **montriĝis**, ke la pozicio de Marr estis malfortigebla.

1. Ju pli intense oni diskutis pri la vojo al la Universala lingvo, des pli minacis **sentiĝi** la kontraŭdiroj regantaj inter teorio kaj praktiko.
2. ...,se la konturoj **forviŝiĝis**, t.e. se la "socialisma enhavo" **pleniĝis** per naciaj simboloj.
3. Ĝuste tia evoluo **kristaliĝis** ekde la fino de 1931.
4. Post la (unua mond-) milito, kiam **senkreditiĝis** la potencpolitiko, **prezentiĝis** novaj ŝancoj por Esperanto, plejpromesiplene en Ligo de Nacioj. Sed ankaŭ **leviĝis** novaj baroj.

- 1) - 4) p.219 - 5) p.348

NOVA TEORIO – EL JAPANIO KAJ NEDERLANDO

Mia hipoteza difino kaj eksplikado, montrita en 1. estas tute alia. Kompreneble mia hipotezo apo-

gas sin sur ne malmultaj skribaĵoj de lingvistoj, filozofoj. k.t.p., sed mi nomu ĉi tie nur du: Kanaya Takehiko, japana lingvisto, longe instruis la japanan en Universitato de Montrealo, Kanado, kaj Jan Gonda (1905 – 1991) lingvisto kaj hindologo, instruis la sanskriton en Universitato de Utrecht. Ili traktis nur medialon de antikvaj lingvoj, tute ne tuŝis la japanan, nek esperanton. Sed estas mirinde, ke iliaj teorioj trafe klarigis ankaŭ medialon en la japana kaj Esperanto.

Kanaya insistas, ke la kerno de la medialo en antikvaj hindeŭropaj lingvoj estas 'foresto de aganto kaj esprimo de forto de la naturo'. Lia emfazo pri foresto de aganto eble venis de lia studo pri 'sensubjekta trajto de la japana kaj antikva angla lingvoj'.

Aliflanke, Gonda, ankaŭ kutimiĝante al strukturoj sen subjektoj en antikvaj lingvoj, ne alprokroĉiĝas al ili, kiel aliaj eŭropaj lingvistoj. En siaj artikoloj Gonda precipe atentis popolan pensmanieron, kiu kuŝas malantaŭ la strukturo de verbo-formoj. Li skribis jene (originalo en la angla).

Duonprimitiva kaj arkaika homo evidente sentis bezonon eviti, pro diversaj kialoj, la aktivan formon, aŭ preferis uzi pli-malpli 'eventivan' esprimon. Anstataŭ atribui la plenumon de procezo al subjekto, kiu en multaj kazoj estis nekonata aŭ nur nebule konata al li, li faris la personon (aŭ objekton), kiu estis la 'loko' de la procezo, la subjekto, kunligante ĝin kun mediala verbo. – *Reflection on the indo-european medium II*. p.180 – 181.

Fakte tiu pensmaniero, kiun Gonda montris, estas vivanta, normala pensmaniero de nunaj japanoj. En Tokio ĉiutage aŭdiĝas anoncoj

de konduktoroj en la trajno, "La pordoj (mal)fermiĝos", kvankam li mem (mal)fermas la pordojn. Alia ekzemplo; Kiam amanta paro informas aliajn, precipe superulojn, pri sia venonta geedziĝo, ili diras, "Estiĝas, ke ni geedziĝos." Aŭ eble pli trafe, "Aferiĝas, ke ni geedziĝos." Sed en kazo de informo al siaj amikoj, ili diras, "Ni geedziĝos." Inter japanoj sentiĝas, ke ili ne agadas intence, sed okazas evento aŭ afero, en kiu ili vivadas laŭ la nerezistebla procedo. Ĉi tio estas sendube la mondo de la mediala voĉo!

LA MEDIALO EN ALIAJ LINGVOJ, EN LA HISTRIA PERSPEKTIVO

Sekve ni pririgardu, kiel la medialo postvivas, travivas, aŭ aliformiĝis en aliaj lingvoj precipe en kelkaj ĉefaj hido-eŭropaj lingvoj.

- Esperanto: La libro bone **vendiĝas**. Medialo
- Japana: sono hon wa yoku **ureru**. Medialo
- Germana: Das Buch verkauft sich gut. Refleksivo
- Franca: Le livre se vend bien. Refleksivo
- Hispana: El libro se vende bien. Refleksivo
- Angla: The book sells well. Medialo?
- Rusa: Книга хорошо продается. Medialo?

En la kazo de la angla, *the book sells well* forme kaj signife aspektas mediala. Iuj gramatikistoj pri la angla nomas ĝin "middle voice" kune kun tiaj aliaj esprimoj kiel *the vase breaks easily* (la vazo

facile rompiĝas). Sed tiuj esprimoj tre ofte uziĝante kun specialaj vortoj, *well, easily, smoothly, comfortably*, ne akordas al la defino de la medialo montrita en 2.

Aliflanke, en Книга хорошо продается, *с*-verbo estas refleksi-va, kaj aspektas same kiel la germana, franca kaj hispana. Sed iuj fakuloj pri la rusa lingvo montras, ke rusoj pli emas uzi senpersonajn esprimojn, kaj ke la rusa havas iom pli fortan inklinon al medialaj formoj.

Laŭ la ĝenerale akceptata lingvistika teorio, en la antikvaj hindeŭropaj lingvoj kiel la hitita, la sanskrita kaj la helenaj troviĝis sistemo de kontraŭstaraj verboj: la aktivo kaj la medialo. Poste tiu sistemo ŝanĝiĝis al kontraŭstaro inter la aktivo kaj la pasivo. La medialo, naskinte pasivon kaj refleksivon, eliris de scenejo. En multaj eŭropaj lingvoj la medialo malaperis kaj kiel supra tabelo montras, la refleksivo anstataŭis ĝin. Aliaj lingvoj en hindeŭropaj grupo, kiel la albana, bengala, islanda kaj sveda, havas la medialon, sed verŝajne ĝi havas malpli grandan rolon ol en Esperanto kaj la japana. Esperanto, naskita en 1887, ne havis historion ĝistiaman, sed ĝia strukturo kaj vortaro estas stampita de la historio de la homa lingvo.

Lastatempe, kelkaj japanaj filozofo kaj sociologo sugestis, ke origine ekzistis la medialo, kiu unue naskis la aktivan, kaj poste naskis la pasivon. Se tiel, la medialo estas la patrino de ĉiu verboformo. Plejparte da lingvistoj, tamen, sen konkretaj lingvaj evidencoj, ne eldiras pri homaj lingvoj en nebura antaŭhistoria epoko. Aŭdaca supozo de la filozofoj estas alloga, precipe por japanoj, kiuj ankoraŭ havas trajton de antikvaj lingvoj, kaj ŝatas uzi senpersonajn frazojn.

HOMCENTRISMO KAJ LINGVO

La filozofoj de antikva Grekio konsideris la naturon kiel generantan vivantaĵon, kiu envolvas kaj vivigas diojn kaj homaron. Sed okcidenta filozofio, evoluinte komence kun platonismo kaj poste kristana teologio kaj natura scienco, atingis al la moderna epoko reprezentata de Bakono kaj Kartezio, kiuj strikte distingis inter la homo kaj la naturo, subjekto kaj objekto. Ĝi starigis memon kiel la absoluton, kaj konsideris la naturon kiel la objekto de homa regado kaj ekspluatado. Jen, kompletigis la homcentrismo, kiu rigardas kiel la plejalto individuon, kiu agadas laŭ sia libervolo apartigite de la naturo kaj sia komunumo.

Paralele al tiu supra evoluo de eŭropa filozofio kaj mondkoncepto, eŭropaj lingvoj ligitaj ne

apartigeble al la pensmaniero, ankaŭ ŝanĝiĝis de naturcentrismo al homcentrismo. Tio estas, ke la pezocentro de lingvaj esprimoj transiris de la priskribo pri okazaĵo al tiu pri certigo de aganto. Ne temas pri “kio okazis”, sed temas pri “kiu faris kion”. Iu subjekto faras ion. Se la rezulto de tiu agado estas bona, ĝi apartenas al la aganto kaj ties posedo estas protektita. Se la rezurto malbonas, la aganto estas punita. Tiamaniere la moderna leĝsistemo kun civila kaj kriminala juro estas bazita sur la moderna lingva sistemo.

DE KIE ZAMENHOF TROVIS LA FONTON DE LA MEDIALO

Ni jam konstatis, ke en Esperanto firme enradikiĝas la medialo kiel nepra elemento de la lingvo ekde la naskiĝo, kaj vigle prenumas taskon por enriĉigi kaj fleksebligi ĝin. Do, nia demando estas, kiom intence aŭ konscie Zamenhof enkondukis la medialon en Esperanton? Fakte, li estis genio en lingvoj, kaj krom lia familia lingvo la rusa, bone lernis la latinan, helenan, hebrean, kaj polan, en kiuj onidire troviĝas pli-malpli la medialo. Li devis scii la gramatikan terminon, la medialo, sed nenie menciis la vorton en la gramatika skribaĵo kiel lingvaj respondoj. Ŝajnas al mi, ke la ekzisto de la medialo en Esperanto estis enkondukita ne de lia pena klopodo sed de lia genia ekbrilo. ■

Fariĝu membro de IKEL



**Valorigu la liberecon kaj la diversecon,
aliĝu al la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
kaj ricevu la revuon *Etnismo* senpage**

LA STATISTIKAJ DATUMOJ: ĈU NI VERE KAPABLAS MEZURI LA SANSTATON DE LINGVO?

Víctor Bargiela

membro de la Grupo de Lingvistoj por la Diverseco
Tradukis Hektor Alos i Font



El iuj sektoroj de la galega socio, precipe el la galegisma maldekstro, la situacio de la kataluna lingvo estas ofte rigardata kiel sekvinda modelo. Tiuj galegoj emas paŭsi la lingvopolitikon de Katalunio kaj ofte ignoras la socilingvistikan situacion de Valencilando, Balearoj, la Aragona Strio aŭ Roselono, kvankam ili konsistigas, tre proksimume, preskaŭ duonon de la katalunlingva parolantaro. Ni vidos, ke la donitaĵoj ne ŝajnas diri la samon, kvankam ekestas la eterna debato: kvalito aŭ kvanto? Ĉu pli gravas havi multajn parolantojn (aŭ pli altan procenton) aŭ havi lingvon kun socia kaj kultura prestiĝo?

Kiel junan barcelonanon, kelkaj lingvaj situacioj mirigas min, kiam mi promenas tra Galegio. Ekzemple, en la lasta parlamenta periodo la Popola Partio inkludis en sian registaron ministerion pri “Kulturo, Lingvo kaj Junularo”, laŭ tre malsama linio de la valencia kaj baleara sampartiaj registaroj. Laŭ mia sperto, estas normale aŭdi laboristojn pri purigado kaj sekureco en la flughavenoj de Santiago aŭ Vigo interparolantaj galege, kaj oni eĉ povas aŭdi la galegan en konversacioj inter membroj de la hispana polico. Kontraste, mi trovis librejojn

kaj aliajn kulturejojn, kie oni insistis servi min en la hispana, kvankam mi uzadis la galegan. Surprizas min ankaŭ, ke pliaĝuloj interparolas galege, sed transiras al la hispana, kiam ili alparolas junulojn. Krome, bedaŭrinde, oni ofte aŭdas konversaciojn en la hispana inter homoj kun fortega galega akĉento, ĉu junuloj, ĉu olduloj, ĉu urbanoj, ĉu kamparanoj.

Se ni ĵetas rigardon al la statistikaj indikiloj, kiuj provas mezuri la sanstaton de la galega lingvo, ni vidos, ke ili ĉiuj ŝajnas multe pli bonaj ol tiuj, kiuj montras la situacion de la kataluna. Laŭ datumoj de la Galega Statistik-Instituto, en 2018 42,2% de la loĝantoj de Galegio havis la galegan kiel denaskan lingvon, 52% regule parolis nur aŭ plejparte la galegan kaj 88% deklaris, ke ili povas paroli ĝin nemalbone aŭ bone.

La katalunlingvaj teritorioj havas konsiderinde pli malaltajn procentojn por ĉi tiuj indikiloj. Por sukcesi kompari, ni devas barakti inter raportoj preparitaj en malsamaj jaroj de malsamaj regionaj institucioj, uzantaj similajn demandojn kaj konceptojn, sed ne tute egalajn. Se ni prenas la tri plej grandajn teritoriojn, ni vidas, ke en Balearoj la kataluna estas

”

Ni homoj plej ofte sentas la bezonon plaĉi al aliaj kaj, kiam ni staras antaŭ enketisto, ni emas favori la starpunktojn, kiujn ni opinias, ke li aŭ ŝi plej ŝatos

”

La esplorcentro Soziolinguistika Klusterra de Eŭskio trairas serion da itineroj en pluraj urboj kaj pere de kompleksa kaj fidinda metodiko ili mezuras la realan surstratan uzadon de diversaj lingvoj

la denaska lingvo de 37,9% de la loĝantaro (2014); en Katalunio, de 31,5% (2019) kaj en la valencilingva areo de Valencilando, de 22,3% (2021). Krome, la kataluna estas la kutima lingvo de 36,8% de la balearanoj kaj 36,1% de la katalunianoj. Por la valencianoj (nur el la valencilingva areo), ni havas ĉi tiujn donitaĵojn dividitajn laŭ uzosferoj. Eblas nur scii, ke 17,5% de la loĝantaro ĉiam aŭ plej ofte parolas la valencian kun siaj amikoj kaj 18,3 % kun siaj najbaroj.

Tamen, se ni volas observi tendencojn, ni povas vidi, en kiun direkton ĉi tiuj datumoj iras, se oni komparas rezultojn tra la jaroj aŭ inter generacioj. En la kazo de Katalunio, la uzo de la kataluna kiel kutime parolata lingvo eĉ pliiĝas, kvankam nur iomete, de 35,6% en 2008 ĝis 36,1% en 2018. Inter generacioj, ni trovas malpliigon de 44,4% ĉe la pli ol-65-jaruloj ĝis 35,2% ĉe la homoj inter 15 kaj 29 jaroj. Tie venas al ni teruraj nombroj el Galegio, kiuj helpas nin kompreni, kiel oni rigardas nin el Atlantiko: la galega estas la kutime parolata lingvo de 73,4% de la pli ol-65-jaruloj, sed nur de 37,4% de la junuloj (15-29-jaruloj) kaj 26,1% de la infanoj inter 5 kaj 14 jaroj.

Rimarkindas, ke la galega demografia situacio estas sufiĉe malsama ol tiu de la katalunlingvaj teritorioj, ĉar 85% de la loĝantoj de Galegio naskiĝis en Galegio. Tio kontrastas kun la 65% de tiuj de Katalunio. Tial en tiu ĉi komparo estas malaktivigitaj ies emoj, atribuantaj la plimalbonigon de la stato de la loka lingvo al la alveno de homoj el alia deveno.

En esploro¹ publikigita en 2017 en *Treballs de Sociolingüística Cata-*

lana, Xaquín Loredó kaj Henrique Monteagudo komparis la intergeneracian transdonon de la du lingvoj. En la galega kazo, multaj kamparanaj familioj enkondukis la hispanan en ĉiujn siajn uzosferojn dum la lastaj jardekoj kaj decidis transdoni ĝin al siaj infanoj. Aliflanke, kelkaj hispanlingviĝintaj segmentoj de la urba etburĝaro konservis aŭ reakiris la uzadon de la galega kiel manieron aserti sian etnan kaj politikan identecon. Tamen la intergeneracia transdono de la galega prezentas negativajn nombrojn kompareblajn al tiuj de Nord-Katalunio. Ĉi tiuj datumoj, aliflanke, estas iomete pozitivaj por la Aragona Strio kaj la valencilingva areo de Valencilando, iom pli bonaj por Balearoj kaj Katalunio kaj signife pli bonaj por Andoro.

Rimarkindas, ke ĉi tiuj raportoj estas ĉiam preparitaj surbaze de la datumoj donitaj de la informantoj laŭ ilia percepto pri ilia uzado de la lingvoj. Ili do estas deklaritaj datumoj. Ili povas ne plene speguli la realon, ĉu ĉar la asertoj respondas pli al la intencita uzo de lingvoj ol al la reala uzo, ĉu ĉar ni homoj plej ofte sentas la bezonon plaĉi al aliaj kaj, kiam ni staras antaŭ enketisto, ni emas favori la starpunktojn, kiujn ni opinias, ke li aŭ ŝi plej ŝatos. Tiusence, unu el la iniciatoj de la esplorcentro Soziolingüística Klusterra² de Eŭskio provas kapti realajn datumojn pri lingvouzado. Por fari

tion, ili trairas serion da itineroj en pluraj urboj en la sep eŭskaj provincoj kaj pere de kompleksa kaj fidinda metodiko ili mezuras la realan surstratan uzadon de diversaj lingvoj, kiel montrite en lastatempa artikolo pri Tolosa.³

Ĉi tiu tuta aro de donitaĵoj helpas nin esplori la situacion de lingvo per datumoj superpasantaj la personajn impresojn, kiujn ni povas havi. Kompreneble, ni ne povas lasi nin skui de ŝoktitoloj kun izolita procento, aperantaj en la amaskomunikiloj, ĉar temas pri datumoj postulantaj kompleksan interpretadon, kiuj respondas al ŝanĝiĝanta kaj diversa socio. Por pliprofondiĝi en la kaŭzojn kaj konsekvencojn de personaj elektoj, ekzistas kvalitaj esplormetodoj, kiuj provas prilumi la diskursojn, kiuj kreiĝas en la socio ĉirkaŭ la uzo de la diversaj lingvoj. Tiuj ideoj emas kaŭzi pli aŭ malpli oftan uzon de la kataluna, la hispana aŭ la galega. Ŝajnas, ke nombro, kiel procento, estas ĉiam pli klara en nia nuntempa mondo, ke ĝi ŝajnas pli rigora kaj pli scienca, sed, finfine, la diskursoj, trapenetrantaj nian socion, ne estas kvantigeblaj, nek la homa konduto estas tia. Tamen, daŭre malfacilas respondi la demandon: kiu situacio estas pli bona, ĉu tiu de la galega aŭ tiu de la kataluna?

*Tiu ĉi artikolo aperis en la kataluna en la retgazeto Vilaweb, kun kiu KEA kunlaboras kaj kiu afable permesis ĝian republikigon.*⁴ ■

1 Loredó Gutiérrez, Xaquín, kaj Henrique Monteagudo Romero. 'La transmisión intergeneracional del gallego. Comparación con el catalán' [La intergeneracia transdono de la galega. Komparo kun la kataluna]. *Treballs de sociolingüística catalana*, n-ro 27 (2017): 99–116. <https://revistes.iec.cat/index.php/TSC/article/view/140476>

2 <https://soziolingüística.eus/eu/>

3 Amonarriz, Kike. 'Evolució i assoliments en l'ús social del basc a Tolosa' [Evoluo kaj atingoj en la socia uzado de la eŭska en Tolosa]. *RLD blog*, 11a de junio 2020. <https://eapc-rld.blog.gencat.cat/2020/06/11/evolucio-i-assoliments-en-lus-social-del-basc-a-tolosa-kike-amonarriz/>

4 <https://www.vilaweb.cat/noticies/mesurar-salut-llengua-opinio-glidi/>

KUNVOJAĜU

Valentin Melnikov

Membro de la Literatura sekcio de Akademio de Esperanto



TATJANA AUDERSKAJA

Tatjana Auderskaja loĝas en Odeso. Ŝi estas biologo kaj ekologo, kaj sufiĉe konata en Esperanto-medio: ekde 1991 ŝi instruas Esperanton kaj gvidas odesan junularan Esperanto-klubon “*Verdaĵo*”, organizis kelkajn Lingvajn Festivalojn, eĉ estis membro de la Akademio de Esperanto en 2019-2025.

En 2010 aperis ŝia sciencopopulara libro: “La mondo en guto da akvo: ilustrita rakonto pri malgrandaj estaĵoj”, ricevinta en 2016 la premion Pirlot por la plej bona scienca libro de 2010-2016. Plie, ŝia pasio estas diversaj intelektaj ludoj – la tradicio de tiaj ludoj dum multaj jaroj floras en ruslingva medio, sed apenaŭ konatas alilande, do en 2016 Tatjana eldonis la libron “Intelektaj amuzoj. Lingvaj ludoj en Esperanto”, penante konatigi la verdan popolon kun tiu inda okupo.

Nun ni povas konatiĝi kun ŝia beletra talento. Prestiĝa eldonojo Dokumenta Esperanto-centro en Ĵurĉevac produktis en 2024 – teknike altnivele kaj belaspekte – ŝian libron “Nokta vojaĝo”. Sur 160 paĝoj troviĝas 60 verkoj, la aŭtorino konfesas: “mi ne estas ŝatanto de grandaj formoj”. La enhavo estas varia, la libro konsistas el kvin partoj.

“Prozaĵoj-Fantasto”: 16 rakontoj de sufiĉe tradicia stilo: aliplanedanoj, pereanta savenda

natur (tre sentebblas la ekologia mondkoncepto de la aŭtorino), danĝeraj eksperimentoj de tro facilanimaj esploristoj, diktatura socio plene reglamentanta ĉiujn vivdetalojn de ordinaruloj (rememoriĝas deprimigaj noveloj de Higinio García). Tro pesimisme, tro malrealisme – sed ŝajne nun ĝuste tiaj fikciaĵoj estas modaj...

“Prozaĵoj-Rakontoj”: 12 rakontoj – el kiuj kelkaj povus aparteni ankaŭ al la unua, fantasta parto. Plejparte temas pri amo, en strangaj ekstremaj kondiĉoj. En kelkaj rakontoj, laŭ nuna tradicio de mikronoveloj, lasta frazo ŝanĝas la tuton. Jen filozofiaj rezonoj: ĉu maljuneco estas malbena aŭ graco? Kelkaj rakontoj estas vere animskvaj. Pleje pensigaj estas la finvortoj de la titoldona novelo: “Ne gravas ja kien! Gravus, ke mi iras kun la plejmulto, kaj jam ne devas en suferoj serĉi MIAN PROPAN vojon! Jen la vojo por ĈIUJ, kaj LA ĈIUJ ne povas erari!”

Sekvas 15 “Mikronoveloj” – kvankam, mi jam diris, apenaŭ eblas meti limon inter diversaj prozaĵgenroj en tiu ĉi libro. Pluraj pecoj traktas analogiojn, paralelecon inter socio kaj organismo, inter viva korpo kaj tuta Tero (la ideo ne novas, tamen...). Ie rolas antikvaj dioj, kaj jen estas kiplingeska fabelo “Kial jaguaro havas felon kun makuloj”... Tre sentebblas in-

dividua stilo kaj “ekologia mondkoncepto” de la aŭtorino.

Du teatraĵoj – tute kutimstilaj. Se ne estus mencioj de kelkaj nuntempaj realaĵoj – eblus kredi, ke “Ama kvadrato” estas verkita antaŭ pli ol cent jaroj, sed ĝi eĉ ne eltenas komparon kun tiamaj priesperantaj teatraĵoj de Karl Minor aŭ Nikolai Hohlov. Ankaŭ la “Rok-opero pri Odeso” ne tre impresas...

Pli bonas la poezia parto. Tamen la serio de parodioj “Griza kapreto” ĝueblas nur por ruslingvanoj, konantaj la parodiitajn poetojn. La stilo de ĉiu poeto rekoneblas eĉ en traduko, tamen kiu ne legis ilin originale apenaŭ kaptos la tutan spriton. “La bela markizino” estas fama francdevena kanto de 1930aj jaroj, bone konata ankaŭ en la rusa versio, kaj en Esperanto ĝin siatempe brile plenumis Veselin Damjanov. Nun Auderskaja sprite travestias ĝin, mokante eternajn problemojn de multaj E-klubo. Sekvas serio da limerikoj, “Soneto pri kato”, amaraj rezonoj pri (mal) progreso de la homaro, kaj pluraj lirikaj poeziaĵoj. Kelkaj poemoj estas distingitaj en la konkursoj “Poezio el ĉiuj ĉieloj” en Italio (2016-2021).

Ekologia mondkoncepto, maltrankvilo pri nuna stato de la naturo kaj de la homaro, traas la tutan libron. Indas fari paŭzon post traŭlego de ĉiu ero, por mediti... ■

POEZIA ANGULO

Nicolau Dols

Lingvisto kaj poeto

Okaze de lia centjariĝo, omaĝe ni publikigas du poemojn de Josep M. Llompart. Josep M. Llompart, majorka poeto kaj kulturaktivulo kiu prezidis Obra Cultural Balear (1978-1986) kaj kuraĝe defendis la unuecon de la kataluna, priskribas en la unua poemo la tedon de dimanĉa posttagmezo en burĝa familio dum sia infanaĝo, kaj la frostigan malĝojon de sia patro, kolonelo, la tagon kiam deklariĝis la Respublikon (la 14an de Aprilo 1931) en la dua. Ambaŭ poemoj apartenas al lia libro *Memòries i confessions d'un adolescent de casa bona* [Memoraĵoj kaj konfidencoj de burĝa adoleskanto], 1974.

ELS DIUMENGES A LA TARDA REBIEM VISITES

Deixaven els abrics al penja-robes
com qui hi deixa la pell de la mort pròpia,
esquifidament quotidiana.
Ben lligada la màscara —la persona
tràgica— sembraven la llavor
de la conversa fonogràfica
dins l'aire de paper
de la sala.
El disc, un xic ratllat, s'entrebancava
adesiara. S'obrien els badalls;
els ventalls
es tancaven.
Hi havia l'oncle, la tia, les cosines
collegiales.
La llum de l'horabaixa
menjada d'arnes.
Jo, en un racó, tot sol, sense fitar
ullades de la mort, jugava
amb els soldats de plom.

1931

Ja se sap que els matinetes d'abril
són lleugers com una carícia.
El pare va arribar capcot amb el diari,
escriidassà els germans.
En el dinar ningú no motava:
“sí”, “no”, “pentura”...
I ullades tristes i soroll de culleres.
Cap al tard
la mare va encendre una animeta
davant l'estampa de la Beata.

En el carrer hi havia una micono de festa.

DIMANĈE POSTTAGMEZE NI RICEVIS GASTOJN

Ili pendigis mantelojn en vestorako
kvazaŭ lasante tie propran morton,
mince ĉiutagan.
Bone fiksinte maskon —la tragikan
personon— ili ĵetis la semon
de fonografia konversacio
en la paperan aeron
de la ĉambro.
La disko, iom difektita, stumblis
iam-tiam. Oscendoj malfermiĝis;
ventumiloj
fermiĝis.
Tie estis la onklo, la onklino, la lernejanaj
kuzinoj.
La fruvespera lumo
tineronĝita.
Mi, en angulo, sola, senkonscie
de mortrigardoj, daŭre ludis
per stanaj soldatoj.

1931

Oni ja scias ke aprilaj matenoj
estas malpezaj kiel kareso.
Patro revenis kapklina kun ĵurnalo,
riproĉis miajn gefratojn.
Tagmanĝante parolis neniu:
“jes”, “ne”, “eble”...
Kaj malgajaj rigardoj kaj manĝilbruo.
Vespere
panjo lumigis kandleton
antaŭ bildo de la Beatulino.

Surstrate aŭdiĝis iom da festobruo.

HÈCTOR ALÒS

«Mi havis la bonŝancon esperantistiĝi en ĝusta momento kaj ĝusta loko»

Ferriol Macip

Ĵurnalisto kaj grafikisto

Hèctor Alòs i Font (Barcelono, 1965) estas esperantisto, lingvisto kaj komputikisto, kiu laboras pri socio-lingvistiko, minorigataj lingvoj kaj maŝintradukado. Li aktive kontribuis al la esperanta movado kaj disvolvis plurajn traduksistemojn por la projekto Apertium. De 2008 li loĝas en Ĉuvaŝio, Rusio, kie li okupiĝas pri la socia situacio de la ĉuvaŝa lingvo kaj la esploro de ties lingva pejzaĝo. Lia laboro ligas teknologion kun lingva konservado kaj edukado, cele al subteno de multlingvismo kaj lingva diverseco.

Kiel vi ekinteresiĝis pri lingvistiko kaj komputado? Kio influis vin elekti tiujn studkampojn?

Verdire, mi ĉefe interesiĝis pri historio, sed mi flankklasis tiun emon kaj elektis studi komputadon nur monaton antaŭ miaj abiturienciĝaj ekzamenoj pro hazarda surstrata renkonto de eksa samlernejano. Ĉefe rolis, ke



”

Pri lingvoj mi fakte sentis neniun apartan alvokiĝon, ĝis kiam mi esperantistiĝis. Sed mi estas terura lingvolernanto kaj, aliflanke, ĉefe interesiĝas pri sociaj problemoj ĝenerale, sekve mi rapide direktis mian rigardon al socilingvistiko

ĝi estis matematikeca kaj pandona, kvankam certe helpis ankaŭ la kreema kaj intelekta aspektoj de programado. Tiam informadiko estis sufiĉe nova studfako, kaj eĉ parto de la studentoj erare elektis ĝin, pensante, ke ili studos “inform-sciencojn”, t.e. ĵurnalistikon. Pri lingvoj mi fakte sentis neniun apartan alvokiĝon, ĝis kiam mi esperantistiĝis. Sed mi estas terura lingvolernanto kaj, aliflanke, ĉefe interesiĝas pri sociaj problemoj ĝenerale, sekve mi rapide direktis mian rigardon al socilingvistiko (sufiĉe komuna afero en tiama Katalunio, cetere).

Vi estis tre aktiva en la kataluna esperanto-movado, vi estis prezidanto de KEJ kaj poste aktiva estrarano de KEA. Dum tiu agadtempo elstaras projektoj en kiuj ni vidas vian manon, kiel Esperanto-kataluna vortaro, kataluna versio de la Zagreba Metodo, revuo *Frequències* pri lingvoj kaj popoloj...

Nu, mi havis la bonŝancon esperantistiĝi en ĝusta momento kaj ĝusta loko. Malgraŭ ke ĝia lingvostukturo tuj sorĉis min, mi survojis tre rapide forlasi esperanton,

ĉar la esperanto-etoso en mia Sant Cugat estis sekteca kaj mesiisma. Feliĉe mi renkontis vigle elstarajn homojn, ĉefe en Sabadell, al kiuj mi multege persone ŝuldas. La bazo de la kataluna versio de la ZM tute ne mias, sed ĝin kreis Llibert Puig tuj post la kataluna kongreso de 1985, kie gastis Zlatko Tišljarić kaj Nikola Rašić. Mi poste evoluigis ĝin, sed ankaŭ aliaj aktivuloj partoprenis, kiel vi mem kaj Pedro Martín. Mi rimarkis ĉi-somere, ke la procezo ne finiĝis, kaj tio tute bonas. Ankaŭ la vortaro rezultis el komuna laboro kun Jordi Carbonell, same kiel *Freqüències* estis kreita kun vi kaj Jomo Milla. Mi mem entreprenis tre malmultajn aferojn sola.

Ankaŭ tiu ĉi revuo, *Kataluna Esperantisto*, spertis altkvalitan ŝanĝon dum vi redaktoris ĝin...

Kion diri? KE-n, se mi bone memoras, mi redaktis en tri malsamaj periodoj. En la unua, mi tute ne kredas, ke mi redaktis ĝin pli bone ol Llibert (kun kiu mi interŝanĝadis plurfoje la redaktoran postenon laŭlonge de pli ol dudek jaroj, kun mallonga parentezo sub la gvido de Lluís Batlle). Mi estis tro juna por tio. La salto ĉefe estis en la prezento, kaj tio ŝuldiĝas al tio, ke ni ekuzis komputilon kaj kalkulis je profesia kompostisto, nome vi. En mia dua redaktperiodo, mi estis iomete pli matura, sed mi ne memoras, ke mi enkondukis ian ajn elstaran ŝanĝon. Tio ja okazis, kiam mi reprenis la redaktorecon el Rusio pro manko de volontuloj. La ŝanĝo estis radikala, sed mi ne kapablis verki bultenon loĝante milojn da kilometroj for. Krome, celo estis ankaŭ atingi legantaron ekster nia verda rondeto per ĝia publikigo en raco.cat, la retejo de la libere

alireblaj katalunaj retrevuoj, kiu postulas nebultenecan formaton. De kelkaj jaroj ni revenis al pli klasika esperanto-revua fasono kaj, pli grave, finfine al redaktado en la Kataluna Landaro.

Vi ankaŭ aktive partoprenis en la laborgrupo kiu kreis la principaron de KEA. Ĉu laŭ vi tiu estas grava momento en la iro de la asocio?

Ĝi ja estis tia por la tiamaj partoprenintoj, kaj la produktitaj Principoj, Celoj kaj Valoroj estis dum eble jardeko fundamento de la asocia agado. Mi iom dubas pri la grado de ĝia nuntempa influo, sed tio estas komprenebla, ĉar feliĉe venis novaj homoj kaj sociaj prioritatoj logike iom ŝanĝiĝis. Ĉiel ajn, mi plej elkore dankas la puŝon de Guillem Sevilla kaj Ruth Rovira, postulintaj la kreadon de tiaj dokumentoj. Por mi estis iom malfacile eniri en la proponitan logikon, sed feliĉe ni disponis je la pria sperto de Gemma Armadans en la estraro. Mi ege kontentas pri la relative longa (ĉirkaŭ unujara) multvoĉa debatado inter asocioj. Ĝi estis tre riĉiga por mi, kaj tio certe permesis, ke la ideoj de la fina teksto bone enradikiĝis en la agadon de la tiamaj aktivuloj. Eble refarinda sperto (sed nepre post la IJK, se ĝi ne malaperigas KEJ-n).

Intertempe, vi ankaŭ estis aktiva en la bulgara movado. Vi kunredaktis, kun Kiril Velkov, du intereseajn verkojn: *Ek al leg'* kaj *Tabuaj Vortoj en Esperanto...*

Mia dujara loĝado en Bulgario (precize unu jaron antaŭ kaj post la falo de la Berlina muro) tre profunde influis min multflanke. En la movada aspekto mi kompre-

nis, kiel esperanto povas fariĝi asocio de ŝtataj funkciuloj, en kiu manpleno da postenuloj defendas siajn privilegiojn (ekonomiajn, vojaĝajn, prestiĝajn). La politikaj ŝanĝoj permesis liberan libroeldonadon kaj kelkaj el ni sentis la bezonon de pli nuntempaj verkoj por relative larĝa bulgara esperantistaro. Miaj du amikoj el la urbo Vraca, Ljubomir Trifonĉovski kaj Kiril Velkov, ĉe kiuj mi ofte gastis, tre aktivis tiu-direkten. Tial ni rapide kunmetis la krestomation *Ek al leg'* surbaze de niaj tre limigitaj personaj bibliotekoj. Ĝian relativan sukceseton ekster Bulgario mi neniam komprenis. Plej verŝajne precipe helpis la ĉipeco de la eldonaĵo. Fakte Kiril kaj mi planis nur legolibron prezentantan la diversecon de la esperanto-literaturo al lokaj nepagipovaj esperantistoj, sed Ljubĉjo estis ege entreprenema. Same okazis pri *Tabuaj vortoj*, kiu estis simpla ludo inter Kiril kaj mi. Mi tute ne antaŭvidis ĝian eldonon fare de la karmemora Ljubĉjo, kaj des malpli en du mil ekzempleroj. Mi gapegis ekscinte la eldonkvanton kaj la relative furoran disvendadon. Tiam mi jam estis reveninta Katalunien.

Vi multe kontribuis al la Apertium-platformo. Kio motivis vin labori pri malfermkoda maŝintradukado?

Nu, kiel multaj esperantlingvaj komputikistoj mi sekvadis la evoluon de maŝintradukado. En Katalunio, ni bonŝancis pri la tre malavara subteno de Manel Vinyals, kiu sponsoradis la kreon de la tradukiloj de la kataluna kaj la hispana al esperanto. En la komenco tion faris fakuloj de la Universitato Pompeu Fabra (UPF) kun la helpo de Xavi

Battle; poste mi mem transprenis la tutan taskon el Rusio. UPF-anoj elektis Apertium, kiu estis bonega elekto en 2007. Grandega atuto de Apertium estas, ke ĝi estas malfermkoda, do ĉiuj lingvomaterialoj libere neprofitcele reuzeblas por konstrui aliajn rimedojn, kiel bitvortarojn aŭ saĝklavarojn. Tiujn eblojn abunde uzas fakuloj de la universitato de Tromsø, kreintaj multnombrajn elektronikajn rimedojn por la uralaj minoritataj lingvoj.

Vi kreis plurajn traduksistemojn (kataluna-esperanto, hispana-esperanto, franca-esperanto, itala-sarda, franca-okcitana, franca-arpitana). Kiel vi elektas kaj prilaboras tiujn lingvoparojn?

Nu, mi neniam kreis, sed kunkreis. Mi tre emas labori grupe, i.a. ĉar miaj scioj ofte estas pli diversfakaj ol ĉe aliaj homoj, sed ĝuste pro tio ili ĉie serioze limigatas. La kataluna-esperantan kaj hispana-esperantan tradukilojn mi here-dis kaj vastigis, dum la franca-esperanta estis relative simila (kvankam ekz. la diversaj duoblaj neo-strukturoj de la franca montriĝis embuskaj). Mi ricevis konstantan helpon de diversaj apertiumanoj, precipe, en la komenco, de Jacob Nordfalk, ekprialaborinta la angla-esperantan tradukilon iom antaŭ ol mi entreprenis la franca-esperantan. Rilate la sardan kaj la okcitanan mi gvidis la laboron de stipendiitoj bone scipovantaj ilin. Ne mi aŭ iu ajn alia apertiumano elektis la lingvojn, sed ili. La stipendiuloj ĉefe okupiĝis pri la vortaro kaj la morfologio, dum mi plenumis la esencon de la komputika tubizado. Pri la arpitana, mi fariĝis la stipendiito, ĉar mi finfine, pli ol 50-jara, ekstudis historion. Mi

iom dubis inter la arpitana kaj la bolonja, sed estis pli da disponeblaj elektronikaj rimedoj por la unua, do mi elektis ĝin (kun la aprobo de la kara Daniele Vitali). Ĉar mi tute ne fakas pri la lingvo, min ege helpis Dominique Stich, la kreinto de propono de tutarpitana ortografio, kaj ankaŭ Alain Favre, latiana IKEL-prezidanto. Pri la sarda ni kalkulis ankaŭ je la nemalhavebla subteno de Diegu Corràine, unu el la ĉefaj pilieroj de la sardlingva eldonado kaj kunkreinto de la norma sarda. Dum komercaj neŭraj tradukiloj jam larĝe superis la rezultojn de la esperanto-tradukiloj de Apertium kaj universitataj samteknologiaĵoj survojas same fari pri la sarda, pri la tre disdialektiĝintaj okcitana kaj arpitana la rezultoj de Apertium daŭre estas la plej bonaj. Inter la multaj neantaŭviditaj aferoj de mia vivo estas tiu, ke mi okupiĝis pri tiuj tri latinidaj lingvoj, kaj tio estas fiereto por mi, ĉar mi sentas, ke mi iomete kontribuis al la emancipiĝo de iliaj parolantoj.

En 2008 vi translokiĝis al Ĉuvaŝio, kie vi laboris kiel socilingvisto.

Prave, plejfine de 2008 mi ekloĝis tie. Mia intereso pri la sociologio de la ĉuvaŝa lingvo tre forte rolis en mia decido, sed mi ja ne tuj laboris kiel esploristo. Mi posedas simplan universitatan gradon pri lingvistiko, do mi tute ne kredis eble okupiĝi profesie pri sociolingvistiko. Tamen mi prezentis kelkajn laboretojn en lokaj konferencoj kaj en 2012 oni invitis min plentempe labori en la Ĉuvaŝa Instituto pri Homaj Sciencoj. Tie mi ĝuis la kvar plej spertoriĉajn jarojn de mia profesia vivo. Tio ŝuldiĝis al la plena esplorlibereco, kiun mi ĝuis, la grandaj facilaj esplori en Rusio, kiam oni mem-

bras en ŝtata organizo, kaj la ĉiutagaj interŝanĝoj kun kolegoj kun jarojn longa sperto (pluraj el kiuj aktive rolis en la porlingva elano dum kaj tuj post Perestrojko).

Vi esploris la rapidan malfortiĝon de la ĉuvaŝa lingvo. Kiuj estas ĝiaj ĉefaj kaŭzoj?

Malfacilas resumi la tuton en kelkaj frazoj, ĉar, kiel ĉiam en tiaj okazoj, kolektiĝas multaj kialoj. Unue, klaras, ke malfacilas konkurenci pri prestiĝo kun ŝtata lingvo kun centoble pli da parolantoj kaj milionoble pli da ŝtata subteno. Se tiu ŝtato (krom dum mallonga postrevolucia paren-tezo) ne nur privilegiadas la hegemonian lingvon, sed samtempe aktive pravigadas la diskriminacion de la minoritataj, la afero pli malfacilas. La ĉuvaŝoj ne sukcesis krei urban ĉuvaŝlingvan kulturon, kaj akceptis la fabelon, ke ilia lingvo taŭgas nur por la kamparana vivo (al kio eblas aldoni kelkajn blufajn erojn de altega kulturo, kiel paron da operoj). La rezulto estas, ke kvankam la lingvo oficialiĝis dank' al Perestrojko kaj lingvoleĝo estis adoptita, la intelektularo tion sukcesinta estis forbalaita de la politika areno pro la katastrofa ekonomia disfalo kaŭzita de la "ŝokterapio" al kapitalismo (kvankam, kompreneble, ili estis plene senrilataj al ĝi). La lingvo fariĝis instruenda al ĉiuj lerne-janoj, sed en la urboj tion faris homoj, kiuj ĉefe parolis ruse kun siaj gefiloj, ĉar enkapigis la miton de la ruseco de la urboj. Ili mem ne bone komprenis (nek daŭre komprenas), kial urbaj infanoj devus lerni la lingvon, krom por eventuale uzi ĝin kun siaj geavoj dum somera vilaĝumado. La leĝon oni plenumis ĉefe formale, kaj ne ĉiam. Sekvis katastrofa malsukce-

so en la instruado de la ĉuvaŝa en la urboj kaj nur tre mallonga malrapidiĝo de la lingvoanstataŭa procezo ĉe la naskitoj ĉirkaŭ la jaro 1990. Aldone, la postkomunisma disfalo de kolĥozoj kaj de la vilaĝa ekonomio plirapidigas la transiron al la rusa en la kamparo. La politika etoso de la lastaj jaroj plifortigas la porrusajn diskursojn, do antaŭvideblas eĉ plirapidigo de la lingvoanstataŭado por la nun kvina rusia lingvo laŭ kvanto de parolantoj, perdinta duonon de sia parolantaro en 21 jaroj, laŭ la du lastaj popolnombradoj.

Vi kreis metodon por analizi lingvan pejzaĝon. Kiel tiu aliro plibonigas la komprenon de urbaj lingvaj dinamiko?

Mi ja nenion inventis. Mi legis galegan esploron uzantan kvantan metodon facile reprodukteblan aliloke. Mi adaptetis ĝin al la lokaj kondiĉoj, kaj kolektadis donitaĵojn. Al mi kvantaj metodoj ĉefe utilis por montri, kiagrade faktoj evidentaj al preskaŭ ĉiuj elstaras. Ekzemple, eĉ blinduloj ne dubas, ke la rusa amase pli uzatas ol la ĉuvaŝa en la afiŝoj, sed eblis pruvi, ke la ĉuvaŝa estas uzata nur en tre specifaj kuntekstoj, kiel la transporthaltejoj, stratnomaj tabuloj kaj po unu afiŝeto ĉe la enirejo en municipaj kaj respublikaj oficialaj organizaĵoj (multe malpli en la federaciaj). Aldone, evidentiĝis, ke la malobservoj al la malmultaj postuloj de la lingvoleĝo abundis. Neantaŭvidite, la reago de pluraj aktivuloj al la rezultoj de miaj esploroj estis tre rapida, kaj diversaj administraciaj oficejoj ekricevis dekojn da plendoj pro neplen-

umo de la leĝaj devigoj. Kredeble tio okazis, ĉar eblis plendi pri tre konkretaj rompoj de la leĝo, dum tio pli malfacilas, kiam temas pri instruado en la lernejoj aŭ familia lingvotransdono. Eĉ la respublika parlamento diskutis, ĉu enkonduki monpunojn pro neplenumo de la lingvoleĝaj postuloj, sed ĝi fine (kaj malsurprize) rezignis pri tio. Kompreneble tiuj plendoj estis tre malmultaj kaj ege mildaj kompare al tio, pri kio ni kutimas de batalharditaj aktivuloj por la kataluna, sed temis pri io tre nekutima de antaŭ du jardekoj en Ĉuvaŝio; krome tio okazis en tem-



La zorgo de esperanto pri egalrajteco, ne nur lingva, kaj ĝia faciligo de interhomaj transnaciaj kontaktoj donas al ĝi gravan potencialon por persona kaj kolektiva emancipiĝo

po, kiam ŝtataj organoj fariĝis pli kaj pli suspektemaj pri eventualaj embrioj de protestmovadoj. Eble ne hazardo ne nur mi tiam perdis sian laborpostenon.

Kaj kiel vi studas la evoluon de la ĉuvaŝa lingvo nuntempe?

Fakte, praktike neniel. Sendependaj sociologiaj esploroj estas ege malfacilaj, se entute eblaj, en hodiaŭa Rusio. Ĉefe pro tio mi povis vigle okupiĝi pri la sarda, la okcitana kaj la arpitana. Nuntempe mian tutan liberan tempon mi dediĉas al la redaktado de la malneto de granda esperanto-kataluna vortaro verkita de Jordi

Carbonell, kiu hontinde kuŝis en mia komputila tirkesto dum deko da jaroj.

Vi studis la ligojn inter esperantistoj kaj lingva/nacia emancipiĝo. Kion tio instruas pri la roloj de esperanto?

Esperanto celas lingvan egalrajtecon, kion la juna Zamenhof konsideris ŝlosila por malaperigi la kontraŭjudan diskriminacion, kiun li suferis, kaj atingi plenan egalrajtecon. Tiun potencialon de internacia neŭtrala helplingvo vidis aliaj homoj, inter kiuj tuj-tuj

elstaris minoritatanaj caraj regatoj, kiel la poloj Grabowski kaj Belmont, la litovo Dambrauskas k.a. La disponeblaj informoj nepridubeble montras la tre fortan super-reprezentigon en la esperanto-movado ĝis almenaŭ 1939 de eŭropaj naciaj malplimultoj kaj de anoj de ŝtatoj sendependiĝintaj post la Unua mondmilito. Samtempe rimark-

endas la elstara disvastiĝo de esperanto en laboristaj medioj en la intermilita periodo, kio montras, ke oni ligis la lingvon al aliaj emancipaj idealoj, nome klasaj. Mi malmulte sekvas la evoluon de esploroj en la lastaj jaroj, sed la ligoj de la tiama esperantismo kun inismo estas ĝis nun, mi timas, malpli studitaj. Feliĉe volumoj kiel *Forte veki* helpas prilumi la pezon de la inaj esperanto-uzantoj en la tuto de la tiama lingva komunumo. La zorgo de esperanto pri egalrajteco, ne nur lingva, kaj ĝia faciligo de interhomaj transnaciaj kontaktoj donas al ĝi gravan potencialon por persona kaj kolektiva emancipiĝo. ■

FA CENT ANYS: LA DICTADURA I EL CONGRÉS DE KEF A PALMA

Xavier Margais Basi
Historiador



La dictadura del general Primo de Rivera continuava ben installada, amb fermesa, aquell any 1925. Era autoritària i profundament anticatalana. Kataluna Esperanto Federacio, KEF, com a organitzadora de l'esperantisme català continuava aposentada a la seu de l'Ateneu Enciclopèdic Popular, on també hi havia el grup Semo, el que tenia més socis i empenta a la ciutat de Barcelona. Aquell any, el congrés anual de KEF i els Jocs Florals Internacionals se celebraren a Palma, tal com s'havia sol·licitat al congrés de 1924 a Vic. Era la primera vegada que KEF sortia del marc provincial on es trobava encotillada per raons de l'autoritat estatal, i ho feu en un espai territorial també de parla catalana. Eren a casa. Aquest fet va valer l'oposició d'algun destacat esperantista militar espanyol, que acusava KEF de voler estendre el separatisme arreu.

De Mallorca estant, l'esperantisme dedicà tota la seva força i capacitat a fer que el congrés i els

jocs florals fossin un èxit, i ho feu amb autèntic fervor. La dotació dels premis augmentà de forma exponencial en relació a convocatòries pretèrites, suficientment perquè eventuais guanyadors d'algun premi es poguessin desplaçar a Mallorca a recollir-lo sense que això significués un càstig a la pròpia economia. Així, hi pogué assistir una guanyadora com Emma L. Osmond, tal com s'explica a Forte Verki.

El nivell literari de les obres presentades fou alt i admirable. La flor natural dedicada a l'amor, la guanyà Artur Domènech, que l'oferí a la Reina de la festa, na Catalina Montaner. La revista Literatura Mondo ressaltà la feina feta pel president d'honor de l'Esperantista Klubo Palma, Narcís Bofill Miró-Granada, i hi inclogué una breu biografia seva per tal que tothom el conegués. Per la seva banda, i com a portaveu de KEF, Kataluna Esperantisto feu un ampli seguiment de la festa i inclogué alguna de les obres pre-

miades, com Ĉe Ŝamovaro, de Julio Baghy:

Ĉe Samovaro

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas,
la amikoj ekparolas.

«Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?»

La hungaro ne respondas,
liaj pensoj geme ondas,
viŝas larmon retenitan.
«Havi landon, sed perditan...»

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume,
ili ploras... ploras kune.

JULIO BAGHY

Premiita en la Xlaj. Floraj Ludoj ■

JOSEP FRANQUESA, L'HOMENOT ESPERANTISTA

Òscar Puig i Cánovas
Ex-president de KEA

En Franquesa ha estat una persona d'aquelles que deixen empremta per allà on passen. Un homenot, com en diria en Pla. La seva família i la meva sempre han anat de bracet, tan diferents, però, alhora, en una simbiosi admirable, cercant el que per ambdós patriarques, el Josep i el Llibert, era el seu màxim objectiu vital, la difusió de l'esperanto.

En tots els records que tinc de la meva infantesa, sempre hi ha en Franquesa, junt amb mon pare, organitzant una cosa o una altra, parlant amb autoritats o convidats. Ja en la vida adulta i com a esperantista conscient, he trobat en Franquesa arreu. Sempre l'he vist com el nostre ambaixador, la persona culta i amb autoritat per representar-nos a qualsevol esdeveniment, a qualsevol racó de món.

No és per atzar que en Franquesa ha estat el soci de KEA que més anys ha exercit de president, setze dels trenta-quatre anys que va ser membre de junta. Un rècord que difícilment serà superat.

La seva exitosa vida professional i esperantista contrasta, malauradament, amb les duríssimes experiències que va haver de viure amb la seva inseparable Mundeta, la prematura mort de dos dels seus tres fills, el Josep amb 45 anys i la Montserrat amb 55. Només una parella sòlida i amb una fortalesa mental fora mesura com la seva, podia suportar aquests dos revessos terribles.

Sobre la seva fructífera vida esperantista se n'ha parlat abastament, tant en mitjans nacionals com internacionals. Voldria destacar que ha estat el primer i únic President d'Honor de la nostra associació, així com també Membre Honorari d'UEA, l'Associació Universal d'Esperanto, però, sens dubte, la seva millor obra és la llavor que va sembrar en la seva pròpia família, que va germinar en la seva malaguanyada filla Montserrat i el seu net Jordi, un dels actius més prometedors de la Joventut Catalana d'Esperanto.

Josep, et som deutors del teu immens llegat i et prometem ser-ne dignes continuadors. ■



JOSEP FRANQUESA, LA ESPERANTISTA GRANDHOMO

Òscar Puig i Cánovas

Eks-prezidanto de KEA

Franquesa estis unu el tiaj homoj kiuj postlasas spuron kie ajn ili ĉeestas. Kiel dirus Pla¹, li estis grandhomo “home-not”. Lia familio kaj la mia ĉiam iris manenmane; tiom malsimilaj ni estis, sed, samtempe, kia mirinda simbiozo en la serĉado de tio, kio estis, por ambaŭ patriarkoj, Josep kaj Llibert, ilia pleja vivmisio, la disvastigado de Esperanto.

En ĉiuj miaj infanaĝaj memoraĵoj, ĉiam aperas Franquesa, kune kun mia patro, organizante ion ajn, parolante kun aŭtoritatuloj aŭ gastoj. Jam en mia adolta vivo kiel memkonscia esperantisto, mi daŭre trovis lin ĉie. Mi perceptis lin kiel nian ambasadoron, la kleran kaj aŭtoritatan homon kiu reprezentis nin en ĉiu ajn evento, en ĉiu ajn mondangulo.

Ne estas hazardo ke Franquesa estis la KEA-ano kiu plej multajn jarojn deĵoris kiel prezidanto: dek ses jarojn el la tridek kvar kiujn li dediĉis al la estraro. Rekordo malfacile superebla.

Lia sukcesa profesia kaj esperantista vivo kontrastas, malfeliĉe, kun la kruelaj spertoj kiujn li devis travivi kun sia nedisigebla Mundeta: la tro frua morto de du el siaj tri gefiloj, Josep 45-aĝa kaj Montserrat kiam ŝi aĝis 55. Nur solida paro havanta senmezuran mensan forton kiel ili ja havis, povis elteni tiujn terurajn vivo-frapojn.

Pri lia fruktodona esperantista vivo oni parolis jam abunde, kaj en naciaj kaj en internaciaj medioj. Mi volas reliefigi ke li estis la unua kaj sola Honora Prezidanto de nia asocio kaj ankaŭ Honora Membro de UEA sed, sendube, lia plej grava sukceso estis la semoj kiuj ĝermis en lia propra familio kaj kiuj ŝpruce floris en la karmemora filino Montserrat kaj en la nepo Jordi, unu el la plej promesplenaj aktivoj de Kataluna Esperanto-Junularo. Josep, via grandega heredaĵo estas ŝuldo kiun ni promesas pagi sekvante viajn paŝojn. ■

¹ Josep Pla (1897-1981), kataluna verkisto (https://eo.wikipedia.org/wiki/Josep_Pla) kiu priskribis diversajn gravajn katalunojn sub la nomo “Homenots”

KRUCVORTENIGMO: BESTOJ

Pedro M. Martín Burutxaga

Lingvemulo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

HORIZONTALE:

1. Besto (kiu teksas). Bestet'. 2. Lasta konsonanto. Bestego. Vokalo. 3. Interne. Vokalo. Malĝustaĵ'. 4. Nitrogeno. Substanco eligita de vulkano. Best'. 5. Produkto de birdoj kaj aliaj bestoj. Speco de arbo (Kristnaska). Vokalo. 6. Vokalo. Prepozicio. Ripetita, kabareda danco. 7. Numeralo. Mallongige, novaĵprogramo de TV3. Best' (hejma). 8. Egipta dio. Japana ludo. Greka litero. 9. Konsonanto. Individu'. Iama komunista Germanio (germana mallongigo). 10. Best' (tre stranga).

VERTIKALE:


1. Besto. Besto. 2. Konsonanto. Nitrogeno. Relativa al vino. Konsonanto. 3. Besto (insekto). Uranio. Unuiĝintaj Nacioj. 4. Natrio. Vokalo. Plia vokalo. Itala artikolo. 5. Besto (granda). Konsonanto. 6. Du vokaloj. Mallongigo de antikva greka monereto. Frankisma propagandilo. 7. Neono. Vokalo. Konsonanto. Doktor'. 8. Besteca homo imagita de H.G. Wells. Japana unuo de longeco (3927,273 m). 9. Vokalo. Oro. Svisa rivero. Konsonanto. 10. Besto (longa). Kalio.

Solvoj en paĝo 39

LA 2025A UK EN ĈEĤIO: BURNA, BUNTA KAJ PIZA

Rafael Blanco

Prezidanto de IKEL, nafarano, aganto en eŭska esperantistaro



La 2a de aŭgusto. La sesa matene. Sono de surtro-tuaraj valizradoj grimpas ĝis la kvina etaĝo de la Q-bloko de la studenthejmo Mendelova JAK. Ne pokaj esperantistoj survojiĝas al busa aŭ trama haltejo cele poste atingi koncernan stacidomon. Kelkajn horojn poste oficiale kaj solene oni deklaras fermitan la 110an Universalan Kongreson.

Ĉifoje pli ol 1100 esperantistoj el 62 landoj veturis al Brno (Burno), Ĉeĥio por ĝui ĉarman kaj certe allogan kongreson ĉe geografia kaj historia koro de Eŭropo, kie kuniĝas la postlasaĵoj de Mendel, Kundera, Komenio, Dvořák aŭ batalvilaĝo Slavkov (Austerlitz) inter multaj aliaj. Kaj ĝuste en tiu plensignifa eŭropa urbo oficialiĝis la transdono de la prezidanteco de UEA al ĝisnuna vicprezidanto Fernando Maia.

Mendel-Universitato kaj Zoner Bobyhall akceptis plurajn programerojn, kiuj pro ilia aktualeco, profundeco aŭ intereso vekis la atenton de la kultursoifa partoprenantaro en ne tro varmaj kaj kelkfoje ŝtormaj tagoj.

Instalaĵoj de la kongresejo, nome, koridora kafejo, restoracio, haloj kaj libroservo efike taŭgis por renkontoj kaj babilado kun novaj aŭ longtempaj konatuloj kaj amikoj; la LKK eĉ havigis al kongresanoj spacojn por ripozo kaj en parko kaj ene de unu konstruaĵo.

Samkiel en ĉiuj UK-j, la programo pleniĝis je interesegaj prelegoj, kursetoj kaj prezentoj, kelkaj el ili samtempaj. Mi devis rezegni pri prelegoj *Komenio, ĉeĥa humanisto; Demenco kaj dulingvismo kaj Voĉo de la Senvoĉuloj: libro pri homaj rajtoj en Norda Koreio*. Tamen mi profitis la okazon ĉe-esti *Omaĝo al Renato Corsetti; Mono de Utopio: la esperantistaj alternativaj valutoj kaj Gregor Johann Mendel* (jes, la pizemulo).

Ankaŭ estis rava la kultura kaj arta programo, kinprojekcioj, buntstilaj koncertoj, teatraĵoj ktp.

Rigardante la muzikajn Esperantajn grupojn de antaŭ tridek jaroj povus konjekti ke oni ne sufiĉe renoviĝis la muzikan scenejon ĉe Esperantujo, sed same veras ke la alportajo de Kajto (belega koncerto) daŭre estas merita; ankaŭ

la prezentoj de Amira aŭ La Perdita Generacio estisplene ĝuindaj.

Restas afero, tamen, por mi rimarkenda: la Gazaa masakro estis nevidebla kaj nepritraktinda.

Tiurilate mi memorigas ke, en la Montreala UK (2022), kvin monatoj post la invado de Ukrainio, ekster la oficiala programo okazis prelego en granda salono pri tiu tiklega kaj doloriga afero.

La kongresa temo jeniis: *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Lastaj militoj, tamen, klare montras kiel plej novaj teknologioj lerte kaj efike utilas por amasmortigo (kiel dum la lastaj 3000 jaroj en la historio de la homaro, do).

Ĉiuokaze, ni povas taksi tiun de Brno kiel belega, bone organizita kaj memorinda kongreso. Kiam ni legos tekston de Kundera, aŭskultos pri Slavkov (Austerlitz) aŭ pensos pri pedagogiaj proponoj de Komenio, ni memoros tiun UK-n, – ankaŭ kiam ni manĝos pizojn, ĉu verdajn aŭ flavajn.

Venonta haltejo, Graz (la 1–8 de aŭgusto 2026). ■

SES MONATOJ SUB LA SUNO

Anna Carpintero Sixto

KEA/KEJ-volontulino

Eble vi jam aŭdis pri mi, aŭ ni eĉ renkontiĝis antaŭe: mi estas Anna, nova esperantistino el Tuluzo, kaj la unua volontulino ĉe Kataluna Esperanto-Asocio (KEA). Jen rakonto pri mia sperto trans Pireneoj.

Por mi, Esperantujo kaj Katalunio estas ligitaj ekde la komenco: kiam mi vidis la eblecon fari civitan servon en Barcelono, mi tuj pensis: “Moĵose! Kion mi devas fari por iri tien? Lerni Esperanton? Tiom interesa!” – kaj jen mi rapide ekesperantistiĝis kun EKC.

En mia kapo, Barcelono estis mita urbo kun agrabla mediteranea etoso, kie oni povas gustumi bongustajn tapojn ĉe la plaĝo antaŭ ol festi ĝis la fino de la nokto. Tamen mi baldaŭ komprenis, ke mi ne estas la sola kun ĉi tiu ideala bildo. Trovi loĝejon en tia granda kaj alloga urbo fariĝis vera defio – ja oni ne simple translokiĝas al Barcelono! Sed bonŝanco estis kun mi: danke al helpema esperantista amiko el Barcelono, kiu enkondukis min al la minorka komunumo, mi trovis loĝejon en nur unu semajno.

Mi finfine alvenis al Barcelono antaŭ ses monatoj, iom ekscitita kaj iom timema, ne konante neniun krom kelkajn kontaktojn

dum RenKEJtigo 2025. Feliĉe Esperanto ne estas nur lingvo – ĝi estas komunumo, malfermita al novaj spertoj kaj plena je afablaj homoj. Tial mi tre rapide renkontis moĵosegajn homojn tie.

Kiel volontulino en Katalunio, mi engaĝiĝis en diversaj taskoj: helpi dum kulturaj eventoj ĉe budoj, partopreni en konversaciaj rondoj, helpi dum kursoj... Katalunio estas tre aktiva loko por esperantumi! Plejparto de la laboro okazis ĉe la sidejo en Sabadell, kie oni ĉiam akceptis min kun varmo kaj bonhumoro, tiel ke la laboro fariĝis vera plezuro.

Danke al KEA, al la famaj bierumadoj de KEJ kaj al la helpo de T-Jove, mia laboro portis min tra la tuta urbo kaj ebligis al mi malkovri nekredeblajn lokojn. Kvankam oni neniam tute liberiĝas de sia *guiri*-eco, tio estis okazo plibonigi miajn katalunajn kapablojn kaj malkovri la riĉajn kulturajn tradiciojn.

Partoprenante lokalan vivon, mi malkovris lingvon kaj tradicion. Tio estis vera ŝoko, ĉar, kvankam Okcitanio ne estas tiom for, en Francio ne plu vere ekzistas la sento de festo kaj najbareco, tradicioj, kaj, kun tio ligite, lingvoj jam ne plu vivas. Sed en Katalunio mi malkovris tutan novan sperton

pri la vivo. Pro tio, mia plej kara memoro restas la tago de Sankta Georgo. La tuta urbo estis plena je ĝojo kaj festema etoso: ĉiuj estis tiel feliĉaj, ke mi ne povis ne ĝui ankaŭ. Tial ankaŭ estis malfacile forlasi Katalunion (sed mi nun aliĝis al *colla* de homturanaroj en Tuluzo kaj mi daŭre lernas la katalunan rete).

Se mi rajtas fari specialan rekomendon al vi, kaze ke vi vizitas Katalunion aŭ bonvenigas esperantan samideanon: nepre iru viziti la muzeon pri la movado en Subirats. Tie oni povas malkovri la historion de la movado en Katalunio.

Nun, post kiam mia volontulado finiĝis, mi sentas grandan dankemon al la Kataluna Esperanto-Asocio. La sperto estis ĝuste tio, kion mi esperis: esperantiĝi, barcelonumi, amikiĝi. Plaĉis al mi la arkivejo, freŝa loko plena je artefaktoj kaj memoroj, plaĉis al mi ĉeesti la esperantistigon de homoj, kiuj tute ne konis la lingvon kaj eliris la kurson kiel novaj KEJ-anoj; plaĉis al mi vendi la *Etan princon* al homoj kiuj ne eĉ parolas Esperanton. Mi forlasas Katalunion kun belaj memoroj (krom la *petardoj*) – kaj revenas hejmen kun multaj esperantaj libroj en la valizo. ■

DE LA NOVA FORNADA

Pedro M. Martín Burutxaga

Tal com vam poder veure al darrer número d'aquesta revista, ara mateix el moviment esperantista juvenil de casa nostra gaudeix de molt bona salut. Les activitats que organitza (*renkejtigoj*, *bierumadoj*...) es succeeixen amb regularitat i gran acceptació; l'actual presidenta de TEJO, la Lucía M. Fernández, és membre de KEJ; es publicita la llengua i s'ofereixen cursos en ambients universitaris, etc, etc.

Part d'aquest èxit es deu a la contínua arribada al moviment de nous joves que, tot aprenent la llengua, entren en contacte amb la cultura i el moviment que s'hi relacionen.

Per conèixer una mica com són aquests joves i què els porta a l'esperanto, entrevistem en Mark Vaquero i l'Iván Zaragoza, que amb 16 i 17 anys respectivament són amb diferència els alumnes més joves de l'actual promoció del curs d'esperanto que organitza KEA a la biblioteca Jaume Fuster de Barcelona.

KE: Parleu-nos una mica de vosaltres. A més d'esperanto, què estúdieu actualment? I quines són les vostres aficions?

Mark: Bon dia, em dic Mark i ara mateix estic cursant 1r de batxi-

llerat de la modalitat humanística. Estudio a la meva ciutat, el Prat de Llobregat, i les meves aficions, a part de la llengua internacional, són la història i fer esport.

Iván: Jo actualment estudio informàtica en un grau mitjà, ja que m'agrada bastant el desenvolupament de programes. Del costat de les humanitats, m'agraden les llengües, això suposo que no és una sorpresa, la història i la geopolítica; encara que m'agrada estudiar aquestes àrees solament per satisfacció personal i no en gaudeixo en àmbits "escolars". A més d'això, m'agrada llegir, veure pel·lícules, tot i que no sé molt de cinema, i els videojocs tranquils. També puc parlar toki pona fluid.

KE: I com és que us vau decidir a aprendre esperanto?

Mark: Doncs bé, el meu professor d'història de 4t d'ESO, en Dani Cortijo, era esperantista i ens va parlar sobre els valors de la llengua, i no sé per què hi vaig quedar profundament interessat. Vaig començar a aprendre-la amb l'aplicació Duolingo al desembre del 2023 i des d'aquell moment no he parat d'interessar-me pel món esperantista i els valors internacionals.

Iván: Des que vaig prendre interès pels idiomes, l'esperanto era

un tema amb el qual em topava amb freqüència. M'interessaven molt les llengües construïdes, i fins i tot vaig intentar fer-ne de pròpies, sense molt d'èxit aleshores, i l'esperanto és de lluny la que té més popularitat i història. Era un tema que anava i venia pel meu cap, però, cada vegada, com més indagava, més em fascinava. Vaig intentar aprendre pel meu compte, però la secundària m'esgotava tota l'energia i era difícil sense altres persones amb les quals parlar.

KE: Com ha reaccionat el vostre entorn (família, amics...) davant aquesta decisió de dedicar-vos a una activitat tan poc habitual?

Mark: La meva família va reaccionar de bona manera, donat que ja coneixien la llengua. Vaig comptar amb el seu recolzament des d'un primer moment. Per part dels meus amics, sí que es van sorprendre, ja que tots havien sentit a parlar sobre l'esperanto, però no hi veien res d'interessant en aquella llengua que havia estat feta per unir els homes.

Iván: En el meu cas, tothom està ja acostumat al fet que faci coses poc habituals, així que no hi ha molt d'impacte. Com a més positiu, la meva mare em va donar molt de suport per a trobar recursos.

KE: Ara que ja porteu un bon grapat de mesos en contacte amb la llengua, heu trobat que tot és tal i com us ho imaginàveu? Us ha cridat l'atenció res en concret?

Mark: Doncs la veritat, no m'ha sorprès res. De fet, és una llengua molt predictable, en el sentit de saber noves paraules, però una cosa que m'ha semblat curiosa és la capacitat dels esperantistes per unir paraules i crear-ne una de nova.

Iván: Jo destacaria que la gramàtica és molt més profunda del que pensava. Coses com la veu passiva, els afixos en verbs, fer comparacions, oracions subordinades i molt més són coses en les quals no m'havia parat a pensar fins arribat el moment del seu estudi, i em va fer reflexionar una mica sobre la idea que tenia de la llengua, que sempre es presenta com a superficialment simple i fàcil, que ho és.

KE: Un mantra que els esperantistes acostumem a repetir amb insistència és precisament la facilitat de la llengua. Què en podeu dir sobre això des de la vostra experiència personal? Esteu d'acord o voldríeu matisar aquesta afirmació?

Mark: L'esperanto és la llengua més fàcil que he vist i ho puc afirmar, però el que sí és cert és que m'ho miro des d'un punt de vista europeu i amb coneixements de l'anglès, així que el vocabulari sí que se'm fa fàcil. Una cosa que m'agrada dir bastant és que en un any i mig que porto aprenent esperanto ja el parlo millor que l'anglès, que el porto aprenent tota la vida.

Iván: Em sembla que l'esperanto té un balanç consistent entre facilitat i naturalitat: Tots els elements estan implementats en el seu mínim exponent; per exemple, només hi ha tres formes per als temps verbals, i tots els objectes tenen la mateixa declinació. I encara hi ha espai per a expressar pensaments més complexos sense molt d'esforç: amb un bon domini lingüístic, podem crear, per exemple, diminutius afectuosos, tot un luxe en una llengua auxiliar construïda. Em sembla que això especialment la diferencia d'altres intents de llengües auxiliars: sembla pensada per a la comunicació entre amics i familiars més que qualsevol altra. Aquestes coses afegeixen més conceptes addicionals a aprendre i dificulten a parer meu l'aprenentatge, però crec que és un sacrifici raonable perquè l'esperanto sigui una llengua més humana.

KE: Mark, pel treball de recerca de batxillerat tu has triat un tema amb l'esperanto. Ens podries explicar una mica de què va i la teva experiència?

Mark: Sí, estic fent el meu treball de recerca sobre la història de l'esperantisme a la meva localitat, el Prat de Llobregat. Sincerament, em vaig llençar a cegues, perquè no hi havia evidència que hi hagués esperantistes al Prat abans que jo, però a poc a poc van sortint coses que han sorprès fins i tot alguns historiadors locals. És una recerca dura i hi estic investigant molt, però en poc temps estaré fent una aportació al patrimoni pratenc i a la història de la llengua.

KE: I després del curs quines són les vostres intencions pel que fa a l'esperanto?

Mark: Jo vull continuar aprenent la llengua i fer-ne divulgació. M'agradaria bastant participar en el proper congrés català d'esperanto a Reus. La veritat, aprendre la llengua és un projecte que globalment m'ha agradat molt. També vull començar a llegir llibres en esperanto per ampliar el meu vocabulari.

Iván: Amb els estudis, a mi no crec que em quedi energia per a fer molt l'any que ve. Però tractaré d'estudiar i practicar el que pugui i intentaré estar en els esdeveniments que pugui. Més endavant em faria il·lusió escriure una obra original en esperanto.

KE: Vaja, un objectiu realment ambiciós, Iván, et desitgem molta sort. I ja per acabar, voldríeu afegir res més?

Mark: Jo voldria afegir que aprendre esperanto m'ha agradat molt. Tot el tema en general és molt interessant i recomanaria l'aprenentatge de la llengua a qualsevol persona que tingui un mínim interès en tots els valors que la llengua transmet.

Iván: És una comunitat molt maca, la de l'esperanto. S'hauria de conèixer molt més.

KE: Moltes gràcies a tots dos per la vostra col·laboració i *gis revido!*

VIZITO DE LERNANTOJ AL CES

Pedro M. Martín Burutxaga

Sabaton la 22an de marto, lernantoj de la kurso, kiun Kataluna Esperanto-Asocio organizas en la Biblioteko Jaume Fuster de Barcelono, vizitis kun sia instruisto la sidejon de KEA en Sabadell. Tie ilin tre afable akceptis membroj de Centre d'Esperanto Sabadell, kiuj montris la lokon kaj informis pri la grava, volontula laboro de konservado, katalogado, skanado kaj reta publikigo de la libroj, kiujn entenas la tiea impona Arĥivo Petro Nuez, frukto de diversaj donacoj. La vizitantoj povis trarigardi kaj miri la kvanton de konservata materialo: libroj, revuoj, afiŝoj kaj ĉiaspecaj esperantaĵoj, multaj el ili veraj unikaĵoj. Fine de sia vizito, la lernantoj kore dankis la donacon de saketo kun paro da libroj, ekzempleroj de la revuo Kataluna Esperantisto kaj aliaj pri-esperantaj materialoj.

Taŭga kolofono de la ekskurso estis posta vizito al la monumento al Zamenhof sur la samnoma avenuo, laŭdire la unua strato en la mondo kiu honoris la nomon de la iniciatinto de nia lingvo. Kuriozaĵo, kiu ankaŭ tre plaĉis al la ekskursantoj, estis la esperanta nomo de tutproksima vendejo: Viando. Temis, kompreneble, pri viandovendejo kun tiu, por ne-esperantistoj, stranga, nekutima nomo. ■



LA SENDEPENDA VIVO DE LA ESPERANTO-GRUPO DE ATENEU LLIBERTARI DE GRÀCIA

Esperanto-grupo de Ateneu Llibertari de Gràcia



Kio okazas kiam lingva kurso fariĝas memstara komunumo? Ekde sia komenco en 2019, la Esperanto-grupo de Ateneu Llibertari de Gràcia travivis transformiĝon, kiu hodiaŭ atingis punkton preskaŭ neatenditan: ĝi funkcias tute aŭtonome, sen bezono de gvidado flanke de la fondintoj, kies rolo fariĝis esence simbola aŭ escepta.

Kvankam komence estis pli klasika instrua dinamiko – kun ins-

truisto, lernantoj kaj strukturo – la grupo rapide evoluis al formo de horizontala kunlernado. Tiun procezon ne kaŭzis iu specifa decido aŭ strategio, sed sintezo de praktikaj bezonoj kaj komunuma spirito. Ankaŭ la diversa deveno de la partoprenantoj – el multaj landoj kaj fonoj – favoris pli malferman, egalecan kulturon de kunlaboro.

Kun la paso de la jaroj, temis ne plu pri instrui aŭ lerni esper-

anton, sed pri uzi ĝin por pensi, diskuti kaj krei. La diskutoj iĝis pli kompleksaj, la nivelo de lingva esprimo kreskis, kaj la respondoj al ĉiaj temoj – sociaj, politikaj, kulturaj aŭ filozofiaj – iĝis pli riĉaj kaj nuancaj. Kaj kiam okazis, ke la kutima kunvokanto ne povis ĉeesti, aliaj transprenis la gvidadon nature kaj senprobleme.

Nuntempe, oni apenaŭ povas paroli pri “klasoj” en la tradicia senco, eĉ se dum la unua parto de ĉiu



La grupo disvolviĝis al spaco kie Esperanto estas ilo por esplori la mondon, por esprimi sin kaj por kunfari interkonscion.

sesio oni klopodas fokusiĝi pri gramatikaj eroj aŭ pli facila kaj didaktika lingva kunlernado. Iel ajn, nuntempe ne ekzistas stabila “instruisto”. Ne ekzistas bezono je unudirekta transdono de scio. La grupo disvolviĝis al spaco kie Esperanto estas ilo por esplori la mondon, por esprimi sin kaj por kunfari interkonscion. Novaĵoj, artikoloj, fikciaĵoj, debatoj, filmoj, humuro – ĉio estas bonvena preteksto por renkontiĝi, pensi kune kaj kreski lingve kaj persone.

La du originaj iniciatintoj, kvankam ankoraŭ proksimaj kaj subtenemaj, ludas nun nur periferian rolon. La vera forto kuŝas

en la memorganizado de la grupo, en la intersubjektiveco kiu ebligas veran dialogon. Kaj tio ne estas malforto, sed signo de matureco. Se iam oni pensis, ke Esperanto bezonas strukturon por supervivi, ĉi tiu grupo montras, ke male: ĝi floras ĝuste kiam oni lasas ĝin vivi per si mem.

La vojo antaŭen? Malferma. Novaj membroj daŭre aliĝas kaj aliĝos. Iuj foriris kaj aliaj eble foriros post kelka tempo, aliaj restos pli longe. Jen la vivo. Sed unu afero restas certa: la spirito de reciproka lernado, de liber-

eco kaj de aŭtonoma kunvivado, estos la vera motoro de ĉi tiu esperantista miraklo. ■

Solvo de la krucvortenigmo de la paĝo 32

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	A	R	A	N	E	O		M	U	S
2	Z		B	A	L	E	N	O		E
3	E	N	E		E		E	R	A	R
4	N		L	A	F	O		L	U	P
5	O	V	O		A	B	I	O		E
6		I		E	N			C	A	N
7	U	N	U		T	N		K	A	T
8	R	A		G	O	O			R	O
9	S		U	L			D	D		
10	O	R	N	I	T	O	R	I	N	K

ASOCIA AGADO

Alfons Tur

Prezidanto de KEA

Verki pri la asocia aŭ movada agado estas ĉiam iom embarasa afero. Ĉu oni skribu sovetecon, tedan raporton aŭ ŝablonan propagandan tekston preskaŭ telegrafe? Troa longeco kaj detalemo riskas enuigi la leganton, troa hasteco perdigus nuancojn, kia defio!

Oni klopodu fari objektivan kaj senpartian trarigardon de la agado... el la subjektiva vidpunkto de la raportanto, kiu krome estas la nuna prezidanto!

Nuntempe la teknologio permesas al ni facilan kaj tujan aliron al novaĵoj, eĉ al tiuj el niaj membroj kaj simpatiantoj malproksime loĝantaj. Pere de la hejmpaĝo, la reta bulteno *esperanto*info*, la sociaj retoj kaj nia Telegramkanalo eblas akurate sciiĝi pri la plimulto el kio estas okazinta kaj okazonta, tiel ke detaligita rakonto kaj rememorigo de datoj, lokoj kaj aliaj donitaĵoj superfluas en la revuo. Permesu ke mi iru per la meza vojo kaj sinteze menciu la agadojn kiuj pli malpli daŭre okazadas “kiel ĉiam”, kaj mi iom pli vaste raportos pri tio, kio estas nova.

En CES la tiea teamo daŭre laboras kun la tasko de katalogado kaj ciferecigo.



En Barcelono kaj Vic okazis ĝis la somera paŭzo la konversaciaj rondoj.

Okazis vizitoj al la Esperanto Spaco en Subirats.

Okazis prezentoj de Esperanto en kulturcentroj Torre de les Aigües (Poblenou, Barcelono) kaj en El vapor (Santa Perpètua de Mogoda). La unuan faris Alfons Tur kaj la duan Carles Verdugo.

En Biblioteko Jaume Fuster, en Gràcia (Barcelono), okazis ĉeesta baza kurso kies instruisto estis Pedro M. Burutxaga.

En marto ni havis la ĝeneralan asembleon en kiu elektigis nova estraro. Oni elektis novan sekretario, Toni Espinosa, kaj memvole ekzigis Maria Sánchez, Enric Pineda kaj Albert Claret; ĉiuj aliaj estraranoj restis en la samaj postenoj.

KEA publikigis kaj prezentis sian lastan eldonaĵon, la libron *Mil cre-*

tins/Mil kretenoj de Quim Monzó tradukita de Antonio Valén, kadre de nia kolekto Grau Casas. Ni volus emfazi kiel novaĵon, ke ĝi estos disponebla en pli ol kvindek katalunaj publikaj bibliotekoj danke al la sindediĉo de nia respondeculo pri eldonado, Carles Vela.

Kiel ĉiujare, KEA starigis budojn la 23an de aprilo – tamen ne nur en Barcelono kaj Sabadell, sed en tri aliaj urboj: en la lasta kongresurbo Vic (kie oni jam starigis budon pasintjare), en la estonta kongresurbo Reus kaj ankaŭ en Vilafranca del Penedès.

Se temas pri budoj, ni partoprenis ankaŭ la foiron Literal, kiel dum la lastaj jaroj. Bedaŭrinde ne eblis ĉi-jare partopreni la foiron de la nacia tago en Barcelono.

Ĝis ĉi tie la raporto pri tio, kio okazis laŭtradicie, simile al la lastaj jaroj. La fakto, ke temas pri eroj ripetigantaj dum jaroj, estas ĝojiga fakto, ĉar ĝi pravas ke nia

agado estas regula kaj ke, spite al stumbloj aŭ etaj misoj, KEA estas organizo kapabla regule, ĉiujare, konstante fari sian taskon.

Kaj jen la veraj novaĵoj de la kuranta jaro:

SEMINARIO POR INSTRUISTOJ

En la lastaj jaroj KEA sentis la mankon de homoj pretaj por instrui la lingvon, ĉar ne simple sufiĉas scii la lingvon sed ankaŭ bezonatas pedagogiaj rimedoj kaj kapabloj. Tial en januaro okazis en nia sidejo tritaga praktika seminario gvidita de Katalin Kováts, kiu ebligis al kelkaj interresitoj prepariĝon kiel instruistoj.

PREMIO POR ESPLORLABOROJ

Jam de pluraj jaroj kelkaj studentoj preparontaj sian mezlernejan esplorlaboron (Treball de recerca) kontaktis nian asocion petante informojn pri Esperanto kaj/aŭ pri la movado, ĉar ili intencis trakti ĝin en sia esplorlaboro. Kiam tio ekkazis, venis en la menson de kelkaj tiamaj estraranoj la ideo starigi premion al kiu povus kandidatiĝi tiuj esplorlaboroj. La ideo restis en la tirkesto dum jaroj, sed fine KEA starigis ĝin kaj en tiu ĉi jaro okazis la unua eldono de la Premio pri Esplorlaboroj pri Esperanto.

PARTOPRENO EN LA UK

Nia asocio ĉeestis la ĉi-jaran UK-n okazintan en la moravia ĉefurbo, Brno, per partopreno en diversaj aranĝoj. Bedaŭrinde ĉi-foje nur la nuna prezidanto povis partopreni nome de la asocio.

La afero ekis per starigo de budo dum la Movada foiro, dum kiu ni

diskonigis niajn eldonaĵojn, diskonis ekzemplerojn de niaj revuoj, flugfoliojn de KEA kaj tiujn de Subirats. Kelkajn el ili ni transdonis al la respondeculoj de la E-muzeo en Svitavy (Čeĥio) por ilia aldono al la tiea kolekto.

Niaj du aktivaj partoprenoj okazis jam vendrede, la 1an de aŭgusto; matene ni prezentis la Esperanto-spacon en Subirats kaj ĉeestis inter 30–40 homoj. La reago estis pozitiva kaj ni ricevis gratulojn kaj laŭdojn, kaj montriĝis eblecoj de kunlaboro kun unuopuloj kaj institucioj.

Posttagmeze okazis la prezento pri la Premio pri Esplorlaboroj pri Esperanto. La ĉeesto estis malmultnombra pro aliaj altiraj samtempaj aranĝoj kaj la lokigo de la salono; ni tamen ricevis laŭdojn kaj oni eble eĉ sekvos nian modelon aliloke.

VOLONTULA PROGRAMO

Alia novaĵo por nia asocio estis nia unua volontulino, Anna Carpintero el Tuluzo. Tiu deĵorado eblis danke al la kunlaboro kun EKC en Tuluzo (Okcitanio), kiu kontaktis nin kaj proponis la eblecon disponi dum kelkaj monatoj de volontulo ĉe ni pere de unu programo subvenciata de la Franca Respubliko. Entiu ĉi numero vipovos legi la raporton de Anna pri sia deĵorado. Nome de KEA mi nur povas laŭdi ŝin kaj gratuli ŝin pro ŝia sindediĉo, laboremo kaj disponebleco kaj substreki ke estis granda plezuro por ni havi ŝin.

AGNOSKOJ

Mi aldonu ke nia asociano Abel Montagut estis elektita kiel nova membro de la Akademio de Esperanto, tiel ke du katalunoj

nun apartenas al la plej grava lingva institucio.

Alia internacia agnosko al niaj movadanoj estis ke Toni Espinosa kaj Nicolau Dols estis premiitaj en la Belartaj konkursoj de UEA.

JUNULARO

KEJanoj mem raportos pli amplekse pri la junulara agado kaj la partopreno en IJK. Tamen, mi volas elstarigi du gravegajn aferojn, nome la elekton de Lucía Fernández kiel prezidanton de TEJO kaj la venontjaran okazigon de la IJK en Katalunio. Ambaŭ estas gravegaj faktoj, kiuj pruvas la viglecon de nia junulara movado kaj ties pezon en Esperantujo.

Ĉar ni estas en la mondo, indas menciigi ke KEA aldoniĝis al la kampanjo por forigo de la mortkondamno al la pedagogo kaj esperantisto Francesc Ferrer i Guàrdia, partoprenis la floran omaĝon en Sabadell okaze de la nacia tago laŭ invito de la municipo kaj publikigis komunikon pri Gazao.

Bedaŭrinde ne ĉio raportenda estas pozitiva, ĉar en junio ni ricevis la tristan novaĵon pri la forpaso de nia honora prezidanto Josep Franquesa i Solé. Ni neniam forgesu ke niaj nunaj atingoj, pri kiuj ni povas fieri, ŝuldiĝas parte al la tasko de homoj kiuj antaŭis nin, kiel nia karmemora Josep.

Kaj tiel ni atingas la finon de tiu asocia aŭ movada raporto. Ni esperas ke ĝi taŭgu kiel rememorigilo de la okazintaĵoj sed ĉefe kiel instigo al pliaj kunlaborado kaj engaĝiĝo de niaj membroj kaj simpatiantoj. Memoru ke KEA estas via asocio kaj ĝi bezonas vin. ■

LASTA AGADO DE KEJ

IJK 2026 OKAZOS EN KATALUNIO!

Hayden Hendricks



*La kongreso koincidos kun mirinda natura fenomeno.
La 12an de aŭgusto oni povos spekti plenan suneklipson, videblan preskaŭ nur en Iberio.*

A OWEN

En Katalunio floradas Esperanto. Jam de antaŭ kelkaj jaroj la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) kreskigis unu el la plej viglaj junularaj movadoj en Eŭropo. La movado plifortiĝis danke al la sukceso de RenKEJtiĝo, la ĉiujara renkontiĝo de KEJ, kaj ĉiumonataj aktivaĵoj kiel bierumadoj, pufmaizaj vesperoj, kursoj kaj festumadoj.

En 2025, KEJ solenis 40 jarojn ekde sia fondiĝo en 1985. Dum tiuj jardekoj, ĝin partoprenis generacioj da junaj esperantistoj, kunigante homojn per entuziasmo kaj bona etoso. Spegulante tiun spiriton, KEJ ĉi-jare elpaŝis por la plej ambicia iniciato en sia historio: **okazigi la 82-an Internacian Junularan Kongreson en Kata-**

lunio. TEJO akceptis la katalunan kandidatigon, kaj la kongreso okazos de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2026 en kongresejo situanta en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelono.

Tiana, kies nomo devenas de la latina nomo *Titius*, kuŝas inter la Mediteraneo kaj la ĉemara montaro. Tiu montaro, iam loĝata de la iberoj, formas la naturparkon Serralada de Marina, verdan rifuĝejon plenplenan je mediteraneaj arboj kaj plantoj. Tie troviĝas la gastejo de IJK: La Conreria, iama monaĥejo kies origino datiĝas de la 13a jarcento. Administrata de la Fondaĵo Pere Tarrés, ĝi disponigos al la partoprenantoj ne nur vastajn eksterajn spacojn kiel naĝejon, sportejojn, ĝardenon, kaj

naturajn promenvojojn tra la arbaro, sed ankaŭ internajn spacojn kiel aŭditorion, salonojn, kaj korton.

Pro ĝia trankvila, izola loko, la kongresejo ebligas al partoprenantoj plene sentiĝi en Esperantujo, kaj, samtempe, la proksimeco al Barcelono permesos ekskursojn por esplori la mirindaĵojn de la ĉefurbo. Pliaj ekskursoj estas planitaj al Taragono, Ĝirono kaj Sant Pau d'Ordal, kie troviĝas la Muzeo de Esperanto de Subirats.

La kongresanoj povos ankaŭ ĝui kaj sperti katalunajn kulturajn kiel gigantojn (gegants), bekkruĉon (porró), homturojn (castells), sardanojn (sardanes), bastondancantojn (bastoners), kaj plurajn pliajn. Por la nok-

ta programo, oni planas inviti muzikgrupojn esperantajn kaj katalunajn.

La kongreso koincidos kun mirinda natura fenomeno. La 12an de aŭgusto oni povos spekti plenan suneklipson, videblan preskaŭ nur en Iberio. Tiu eklipso estos la unua el serio da tri suneklipsoj trafantaj Iberion en 2026, 2027, kaj 2028, post preskaŭ 120 jaroj sen plena eklipso sur la kontinenta parto de Hispanio. Nur la eklipsoj de 2026 kaj 2027 estos plenaj, dum tiu de 2028 estos ringoforma. Ringoforma suna eklipso okazas kiam la luno troviĝas iom pli for de la tero, tiel ke ĝia ŝajna diametro ne tute kovras la sunon, lasante brilantan lumoringon ĉirkaŭ la luno. En Katalunio oni povos vidi la plenan eklipson de 2026 kaj la ringoforman de 2028. La plena eklipso de 2027 estos observebla nur en la plej suda parto de Hispanio kaj en norda Afriko.

Aldone, kongresanoj ankaŭ havos ŝancon ĝui Jaron Gaudí, solenante la 100-jariĝon de la morto de la mondfama arkitekto, koincide kun la kompletigo de la ĉefaturo de La Sagrada Família post preskaŭ jarcento kaj duono da laboro. Pro la natura fenomeno de la suneklipso kaj la graveco de naturo en la arkitektura majstraĵo de Gaudí, la temo de la kongreso estos “Naturo el la Homaj Okuloj.” Ĝi celas inspiri dialogon pri daŭripovo kaj interkultura kunlaboro. Dum unu semajno en la montoj de Tiana, centoj da junuloj el la tuta mondo uzos komunan lingvon por pripensi komunan vojon antaŭen.

Nun estas via tempo por tuj aliĝi al la IJK 2026: vizitu la retejon de la kongreso, ijk2026.tejo.org, por legi ĉiujn informojn kaj aliĝi per la aliĝilo. ►

RENKEJTIĜO 2025 EN OLOT

Òscar Hernández Rodríguez



K E J festis sian 40-jariĝon dum 2025, kaj la centra solenaĵo de tiu festado estis la ĉi-jara RenKEJtiĝo, kiu okazis en Olot dum 4 februaraj tagoj. Pli ol kvardek junuloj de Katalunio kaj multaj landoj vojaĝis al La Garrotxa por festi kaj ĝui la etoson. La loĝejo estis fajne kaj lukse ornamita palaceto de la 1920aj jaroj: perfekta ejo por soleni tiel gravan jubileon.

Dum RenKEJtiĝo okazis ekskursoj al Olot, la vulkanoj de la urbo kaj La Fageda d'en Jordà, kie homoj povis lerni kaj sperti la eksterordinarajn naturajn kaj geologiajn ecojn de la regiono. La aranĝo estis plena ankaŭ je multtemaj atelieroj, kiel kvantumaj fiziko, minoritataj lingvoj, drogdependenco aŭ horizontala organizado.

Kromtio, unu el la plej atenditaj kaj pintaj programeroj de RenKEJtiĝo estis la solenaĵoj pri la historio de KEJ, kio inkluzivis spektaklon kun pufmaizo de la nova dokumentfilmo pri la historio de

nia asocio (spektu ĝin ĉe la jutubkanalo de KEJ), kaj diskutprelegon kun la iamaj aktivuloj de KEJ, ekde la 80aj jaroj ĝis nuntempe, kiuj rakontis anekdotojn kaj rakontojn pri la diversaj epokoj de nia junularo, kiu feliĉe nuntempe ĝuas unu el siaj plej bonaj momentoj.

La programo de RenKEJtiĝo havis eĉ surprizan programeron, en kiu la reĝino Carnestoltes envenis en la kongresejon kaj semis ĥaoson kaj diboĉon. Post freneza kaj amuza komuna dancado de *sardanes*, la reĝino Carnestoltes kaj sia sekvantaro paradis ĉe la balustrado de la balkono de la palaco kaj eldiris sian karnavalan diskurson, plena je ŝercoj kaj amaraj kritikoj por ĉiuj.

La okazo de tiu RenKEJtiĝo en Olot, kiu estis jam la tria post tiuj de Manresa en 2023 kaj L'Espluga de Francolí en 2024, firmigas la ideon, ke RenKEJtiĝo iĝu longdaŭra tradicio en KEJ. ►

KEJ EN LA IJK 2025 EN INDONEZIO

Ĉi-jare naŭ KEJ-anoj vojaĝis al Indonezio por partopreni en la 81-a Internacia Junulara Kongreso. Du el ili renkontas pri siaj spertoj tie.



Hayden Hendricks

Unu el la plej neatenditaj, tamen neforgeseblaj, spertoj de IJK 2025 estis la muzikinstrumentoj. Okazis la unuan plenan tagon de la kongreso ateliero pri la anglungo, tradicia indonezia muzikinstrumento farita el bambuaj tuboj, aranĝitaj en vico laŭ la tongamo. Por sonigi la tonaltojn, oni ŝancelas stangeton apartenantan al ĉiu tubo. Por la ateliero, la instruisto elprenis la tubojn el la kadro kaj disdonis ilin al la partoprenantoj, tiel ke ni ĉiuj havis nur po unu numeritan tonon. La dirigento fingromon-

tris numeron por signali al ni, kiu ŝancelu sian anglungon por sonigi la ĝustan tonalon. Post kelkaj provaj ekzercoj, aldoniĝis profesia kantisto al nia orkestro, kaj ni kune ludis plurajn belajn kantojn. Poste, dum la vespera programo, ni havis la ŝancon spekti indonezian musikgrupon, kiu ludis indonezian pop-muzikon per basgitaro, ksilofono, kestotamburo, kaj (plena) anklungo.

Okazis la lastan plenan tagon de la kongreso alia ateliero pri la okarino, fluteca blovinstrumento tipe farita el argilo aŭ ceramiko. Kvankam antikvaj versioj povis sonigi nur kelkajn tonaltojn, restrukturoj en la 19a kaj

20a jarcentoj vastigis la nombron de truoj al 12, permesante al la instrumento sonigi plenan kromatan oktavon. Virino el Ĉinio kunportis al la kongresejo kvar okarinojn el ceramiko kaj instruis al ni kiel ludi ilin. Pro mia evidente supera ludkapablo, mi estis unu el la bonŝanculoj, kiuj ricevis donacitan okarinon, kiun mi (malgraŭ la ĉagreno de miaj kunloĝantoj) nun ĝuas hejme en Barcelono.

Alia neforgesebla sperto de IJK estis la trinkomanga vespero. Mi forte antaŭĝuis la eventon, kaj mi ne estis seniluziigita. Ĉiuj manĝaĵoj havis etiketojn por faciligi la partoprenon de tiuj havantaj dietajn limigojn, certigante ke ĉiuj veganaj manĝaĵoj estus formanĝitaj. La vasta gamo de bongustaĵoj kaj trinkaĵoj ĉe la indoneziaj kaj filipinaj tabloj estis impona, sed mi ĝuis ankaŭ la tute veganajn manĝaĵojn ĉe la germania tablo. Pro la penego de mi kaj miaj samlandanoj provizi tradiciajn bongustaĵojn el nia lando, mi sentas min devigita priskribi ankaŭ la usonan tablon, malgraŭ ĝia malema ricevo de kongresanoj: PB&J (sandviĉoj el ternuksbute-ro kaj marmelado), kondensita tomata supo de Campbell, oksikoka saŭco, kaj sekvinberoj el Kalifornio. Tamen, la plej populara tablo estis ankaŭ la plej bona: la kataluna tablo, ĉe kiu oni povis ekzerciĝi en bekkruĉumado (porró) kaj sin pretigi por IJK 2026. Feliĉe, tio jam pretas ĉe mi. ►

Pol Jiménez

En aŭgusto 2025 mi partoprenis la Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Cisarua, Indonezio, kiu fariĝis por mi unu el la plej memorindaj renkontiĝoj en mia esperantista vivo. Mi ne estis simpla partoprenanto: ĉi-foje mi aliĝis kiel helpanto, kiel gajninto de la fonduso “Partoprenu IJK-n”). Tio signifis, ke mi ne nur aliĝis al kelkaj programoj kiel partoprenanto, sed ankaŭ enkondukis la katalunan lingvon, helpis dum la realigado de Kukumio, kaj ĉefe trinkejstrumis. La respondeco pri la trinkejo ne nur kuntrenis malfirmi kaj fermi ĝin ĉiunokte, sed ankaŭ ke mi devis kunzorgi pri la trinkaĵprovizo kaj ĝia ordigo. La plej granda defio venis ĝuste de tiu malfacilaĵo kiam oni provas aĉeti alkoholajn trinkaĵojn, ne tre simpla afero en islama insulo, kie tia komerco estas ege limigita. Tamen, kun helpo de organizantoj kaj unuhora veturado al granda butikcentro kaj reen, ni sukcesis aĉeti ĉion, kaj la trinkejo fine funkciis glate dum la kongreso.

Unu el la plej impresaj momentoj por mi estis la trinkomanĝa nokto. Ĉar la kongreso okazis en Sudorienta Azio, venis partoprenantoj el preskaŭ ĉiuj partoj de la kontinento. Tio estis mirinda ŝanco gustumi tipajn manĝaĵojn el landoj, el kiuj mi kutime ne konsumas manĝetojn. Bedaŭrinde, la plejmulto de partoprenantoj kunportis dolĉaĵojn (bedaŭrinde por diabetulo kiel mi), kio estis surprizo por mi ĉar en aliaj aranĝoj, kiujn mi partoprenis, mi kutime vidis pli da trinkaĵoj aŭ salaj manĝetoj.

Mi ankaŭ partoprenis ekskurson al safariparko, kie mi ekkonis kaj vidis la plej ĉarman kaj brakum-



indan beston en la mondo: la ruĝan pandon. La ekskurso komenciĝis per kunveturado inter ne enkaptitaj bestoj, kaj poste ni promenitis libere kaj povis ĝui la tutan parkon libere, kion mi plej ĝuis. Dum promonado tra la besto-parko, kiun mi faris kun kelkaj samideanoj, ni sukcesis trovi Komodo-varonon, unu el la plej interesaj bestoj, kiujn mi iam vidis. Estis fascine vidi kiel ĉi tiuj estaĵoj estis tiel trankvilaj, sciante ke ili povas esti ege facilmovaj kaj rapidaj.

Ankaŭ rimarkeblas, laŭ mia vidpunkto, la malsama pleneco inter la taga programo kaj la vespera aŭ nokta. Dum la tago la etoso estis ege vigla, kun prelegoj, diskutoj kaj atelieroj ĉiam plene okupitaj, ofte kvar samtempe. Oni povis senti fortan engaĝiĝon de la partoprenantoj.

Kontraste, la nokta vivo estis pli trankvila kaj modesta, kun malmultaj homoj kaj relative fruaj enlitiĝoj. Tio ankaŭ estis unufoja sperto, ĉar en ĉiuj junularaj E-renkontiĝoj, kiujn mi jam partoprenis, la nokta programo estis eĉ atendita de la partoprenantoj dum la tago. Tamen unu afero restis tute neŝanĝebla: la kongresa karaokeo. Ĉiun nokton, senescepte, homoj kolektiĝis senlace por kanti, kaj la listo de kantoj neniam finiĝis!

La tuta sperto por mi estis ĝojega kaj riĉiga. Mi ĝuis labori en trinkejo, lerni kaj interrilati kun esperantistoj el tiom multaj kulturoj. Kaj nun, post reveno hejmen, mi sentas fortan deziron reviziti Indonezion por pli profundigi en ĝian kulturon kaj sperti la mirindan diversecon inter ĝiaj insuloj. ►

KEJ-ANOJ EN FESTO 2025, EN MOISSAC

Post kelkaj jaroj, la francaj junuloj decidis revivigi iaman Esperanto-renkontiĝon. Temas pri FESTO, la Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita. La nomo estis jam tradicia, sed la organizantoj strebis ne kongrui la ĉi-jaran sperton kun ĝi. Ili alprenis la engaĝiĝon kaj celon organizi paradizon por muzikemuloj: FESTO estu plenplena je muziko, kantado, koncertoj kaj muzikatelieroj. Ĉi-jare ĝi okazis en Moissac, proksime de Tuluzo, kaj kelkaj KEJ-anoj vojaĝis por partopreni ĝian buntan programon. Ni legos la sperton en tiu aranĝo de Pol, kiu flugis al Francio por partopreni FESTO-n tuj post kiam IJK 2025 finiĝis kaj li revenis de Indonezio.

Pol Jiménez

Kiel la plejmulto el la partoprenantoj de ĉi-jara FESTO povas konfirmi, unu el la plej rimarkindaj aferoj estis la nokta programo. Ĉiu-vespere la trinkejo malfermiĝis, kaj homoj ĝuis la diversajn koncertojn inter amikoj kaj trinkaĵoj. Post la koncertoj, la nokto daŭris per diskejo, karaokeo, aŭ eĉ ludoj kiel trinkeja kvizo. Tamen ankaŭ estis spaco por pli trankvilaj aktivaĵoj, kiel ĝuindegaj akustikaj koncertoj en la gufujo, kie mi malkovris tre belajn voĉojn de kelkaj samideanoj! Kaj ĉefe la kongresejo estis perfekta por neatenditaj babiladoj kun aliuloj, kiam oni iris de loko al loko.

Eĉ se la nokta programo estis unu el la ĉefaj fortoj de la franca renkontiĝo, la taga programo same estis tre riĉa kaj diversa. Miaflanke, mi plejparte par-

toprenis la projekton de la Franc-Germana Junulara Agentejo pri muzikokaj muzikkreado en Esperanto. Tiun projekton, en kiu partoprenis ĉirkaŭ dekduo da homoj, mi kunrespondeis kun Linda kaj Giorgio, kiuj estis tre helpemaj kaj afablaj kunlaborantoj. Mia ĉefa respondeco estis koruses-tri; ekzercigi, praktikigi kaj gvidi la koruson formitan de la projekt-partoprenantoj. Ĝi estis defia sperto, ĉar ne ĉiu membro havis antaŭajn muzikkonojn, sed ankaŭ tre bela kaj instrua sperto gvidi kaj spertulojn kaj komencantojn miksite. La fina rezulto estis tre pozitiva, kaj ni montris la rezultojn en koncerto je la fino de la semajno, antaŭ la fino de la renkontiĝo.

FESTO 2025 estis entute tre riĉiga kaj ĝoja sperto, kaj ĝin eĉ sekvis amuzega post-FESTO-festumado en Tuluzo dum du tagoj! ►

PLUVO

Xavier Rebled Marín

Ŝajnis pluvo cindraĵoj
de diaĵo nekredinda.
Jen kaj jen forkuris inko
laŭ la vejnoj urbaj grizaj.
Estis riveroj sen fiŝoj
trotuaroj malfeliĉaj.

Malrapide memoraĵoj,
pasintecoj paradizaj,
revenis al ĉiuj koroj
en tiu vespero vintra
kaj pli doloris ol mil
kudriloj el fer' glaciaj.

Akvo, malvarmo, soleco
sub la sun' malaperinta
kaj blanka tuk' de ĉielo,
kiso malseka kaj vitra,
fadenoj en horizonto,
vakuo en la benko ligna;

ĉiuj estis de la pluvo
karakteroj tragediaj,
forgesotaj siluetoj
sub la lampfostoj trovitaj,
kiel hom', kiu suferas
kaj silentas kaj sopiras.

Jen la timema murmuro,
elegio neskribita
de la gutoj sur la stratojn,
sur la tegmentojn senfinajn,
ŝajnis preĝo de l' objektoj
al absenco diigita.

Jen la pluvo, cindraĵoj,
cindraĵoj sed sen fajr' nek ĝia
varma kares' en la nokto
kajespera kaj lumiga,
sed cindraĵoj pro la grizeco
de la betono senviva,
kiu ricevas la pluvon
kvazaŭ larmojn korŝiritajn. ■

PROFESIA SEKRETO

Viktoro Solé

Muzikinstruisto



Antaŭ multaj jaroj, kiam homoj kutimis retpabli pere de la tiama mondfama komputila apo Messenger, mi estis instruisto en muziklernejo de mezgranda urbo proksima al Barcelono, kie mi loĝis. (La leganto de ĉi tiu teksto eble demandas sin, kia povus esti la rilato inter muzikinstruisteco kaj la koncepto de profesia sekreto, kiu estas pli komprenebla, kiam oni parolas pri advokatoj, kuracistoj aŭ eĉ konfesprentoj. Tamen, ne zorgu, la afero klariĝos poste).

Iun tagon, post klarigoj pri muzikaĵo, kiun nun mi ne kapablas rememori, mi disdonis paperfoliojn kun liniaroj kaj demandoj, por testi, ĉu la gelernantoj komprenis tion, kion mi ĵus klarigis. La studentoj komencis solvi la proponitajn ekzercojn kaj mi tuj rimarkis, ke la plej belaj gejunuloj, ambaŭ deksejaraj, estis farantaj la taskon kune. Ĉio en ordo, mi pensis, kelkfoje teama laboro estas pli efika ol lernado nur per si mem. Instrui unu la alian taŭgas, ĉar ofte iliaj reciprokaj klarigoj pli efikas ol la instruistaj. Ili ja es-

tas en la sama nivelo kaj uzas pli similajn esprimmanierojn. Kiel instruisto mi ofte uzas ĉi tiun pedagogian strategion, ĉefe kiam studento havas dubon kaj mi profitas la okazon por peti la koncernan klarigon de alia klasĉambriano, kiu ĵus ekkomprenis la aferon. Estas bona ekzerco ankaŭ portiulasta, ĉar oni ne plenposedas novan koncepton, ĝis oni kapablas ĝin klarigi aliaj.

Kiam la leciono finiĝis, ili redonis la paperfoliojn al mi kaj, en la trajno hejmen, mi komencis la reviziadon. Fininte la korektadon de ĉiu ekzerco, mi lasis la paperfoliojn surdorse sur la apudan liberan sid-lokon. La lasta ekzerco estis tiu de la belulino, kaj metinte ĝin sur la aliajn, mi tuj rimarkis, ke estis longa manskribado sur tiu flanko, kiu devintus esti blanke malplena. Surprizita, mi eklegis tiun neatenditan tekston, kiu montriĝis kiel duamana manskribita babilado inter du freŝaj koramikoj. Mi supozas, ke ili ofte estis uzantaj tiun Messenger-apon por babilu elsia hejme, sed ĉi-okaze ili uzis la malplenan

dorson de la ekzerca paperfolio en interesege teknika movo malantaŭen: el elektronika babilado longdistanca al papera manskribado ŝultron ĉe ŝultre. Tiam mi komprenis la veran celon de tiu klasĉambra kunlaborado kaj mi konkludis, ke tiu teorio pri la avantaĝoj de grupa laboro ne validiĝis tiam, malgraŭ ke, ĝenerale, ĝi estas pozitiva afero, eĉ kun la risko de voĉiĝi de la intencita celo.

Multaj jaroj forvaporigis kaj, kompreneble, mi ne kapablas rememori la precizan enhavon de tiu spica konversacio, sed temis pri la tipa babilado inter du ĵus enamiĝintaj gejunuloj. La sekvan semajnon mi redonis la revizitajn ekzercojn, kaj kiam mi estis dononta la ekzercojn al la belulino, montrante la ekzercon flankon al ŝi, mi demandis: “vi scias, kio estas en la dorso, ĉu ne?”. Post kelkaj sekundoj ŝi ekkonsciis, kien iris la perdita papero kun la ama babilado, kaj iĝis la plej bela ruĝiganta junulino. “Ne timu”, mi diris, “estas profesia sekreto”. ■

Tiu teksto unue aperis en la rubriko *La Fenestro* el la revuo *Kontakto* (<https://www.tejo.org/agadoj/revuo-kontakto/>)



Tiana, Katalunio

ijk2026.tejo.org

41è
congrés
català
d'esperanto

9-12 d'octubre 2026

RE
US
26

41-a
kataluna
kongreso de
esperanto

9-12 de oktobro 2026

esperanto.cat